

EL POPOLA

中國報

8 1981

ĈINIO



Vivo de ĉinaj handikapuloj



Surdmutulinoj en teksado de tapiŝo

Ĉinaj handikapuloj estas prizorgataj kaj protektataj de la registaro kaj socio. La popola registaro fondis lernejojn por blinduloj kaj surdmutuloj, inter kiuj iuj ne postulas de lernantoj pagon por edukado kaj lernolibroj. Rilate al malriĉaj lernantoj, la lernejoj senpage liveras al ili manĝaĵojn aŭ postulas de ili nur parton de la pago por manĝaĵoj. Ĉiusabate, la lernejoj veturigas, per specialaj aŭtomobiloj, la blindajn infanojn hejmen. Pli kaj pli multigas porhandikapulaj fabrikoj funkciigitaj de la ŝtato aŭ de kolektivo kun subvencio de la ŝtato. La ŝtato favoras tiujn ŝtatajn fabrikojn per nekolektado de profito, por ke ili mem disponigu ĝin por pligrandigi produktadon, havigi laboron al pli multaj handikapuloj kaj plibonigi vivkondiĉojn de la laboristoj kaj oficistoj. En la lastaj jaroj la ŝtato konstruigis en Beĵing por handikapuloj fabriksdomojn kun plankareo de 6.000 kvadrataj metroj kaj loĝdomojn kun plankareo de 10.000 kvadrataj metroj. Nun en diversaj lokoj de Ĉinio disvolvigas bonfaraj aktivadoj de gejunuloj kaj geknaboj, en kiuj ili ĉiamaniere klopodas por helpi la handikapulojn en ilia vivo.




Konduktorino helpas kriplulon enbusiĝi.

Surdmutaj geamantoj





Liu Jingsheng perdinta ambaŭ brakojn estas lerta en ĉina kaligrafio.



Por havigi artefaritan kruron al kriplulino

Surdmutaj geedzoj kaj ilia infano





Lernantinoj de la Beijing-a Kvara Surdmutula Lernejo sin ekzercas en tamburado.

740 blinduloj kaj surdmutuloj partoprenis en la sportkunveno okazigita lastatempe en Beijing. La foto montras kuran konkurson de surdmutuloj.



Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

SUR LA KOVRILO:

Instituto de la Hangzhou-a Dua Medikamenta Fabriko sukcese faris ĉinmedicinan medikamenton kontraŭ kadukiĝo — reunigan tablojdon. Jen esploristino analizas la medikamenton.

Foto de LI CHUNGENG

KOLORAJ SERIOJ:

Vivo de ĉinaj handikapuloj

Maŭzoleo de Sun Jatsen

Fotoj pri naturaj belaĵoj faritaj de E-istoj:

Ĉielarko

Lotusfloroj

Kantoj kaj dancoj de ŝe-oj

Popolaj metiartaĵoj de Guizhou

NIGRAJ-BLANKAJ SERIOJ:

Song Qingling, honora prezidanto de la Ĉina Popola Respubliko

Vizitgrupo de ELNA en Ĉinio

Nacia sporto

SUR LA DORSKOVRILO:

Kazaĥa Knabino kaj Tri Ŝafidoj

Olepentraĵo de XING LIAN

—◆—
Generala distribuanto: Esperanta
Sekcio de GUOJI SHUDIAN
(Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj)
P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

Enhavo

Song Qingling — eminenta virino de Ĉinio	2
Eternan gloron al k-dino Song Qingling	4
Ekonomiaj atingoj de Ĉinio en la pasintaj 30 jaroj	7
KURANTAJ AFEROJ	13
KORESPONDI DEZIRAS	13
Gratulon al la 66-a Universala Kongreso	14
Memorinda vojaĝo	15
NIA KULTIVEJO: Usonaj Geamikoj en Ĉinio	16
Kion mi vidis en Ĉinio	20
Vivu la amikeco kaj kunlaboro	22
KALEJDOSKOPO	23
VIDINDAJ LOKOJ: Maŭzoleo de Sun Jatsen	24
ESP-NOVAĴOJ	25
KULTURAJ NOTOJ	27
Somera tago (poemo)	27
Somervespero (poemo)	27
Ĉinaj handikapuloj	28
Vivo de ĉinaj blinduloj	30
SPORTO	32
Amputita junulo kaj lia amatino	33
La sepdeka printempo	35
Vojo al sukceso	38
Brazilo — granda sudamerika lando	40
Ĉe la rokmuro Chibi	41
Bela Bartok (1881—1945)	43
HISTORIAJ OBJEKTOJ: Antikvaj freskoj de Tibeto	44
Vendado de kraboj	45

SONG QINGLING—EMINENTA VIRINO DE ĈINIO

SONG Qingling estis unu el la plej eminentaj virinoj de la mondo en nia jarcento. Dum la 31 jaroj post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, ŝi estis unu el ĝiaj gvidantoj. Antaŭ tio ŝi aktive partoprenis en longa batalo por emancipi la nacion kaj la socion.

Ŝi naskiĝis en Shanghai (Ŝanhajo). Ekde sia 14-15-jara aĝo ŝi estis edukata en Usono. Kiam eksplodis la Revolucio de 1911, kiu renversis la 2,000-jaran feŭdan monarkion, ŝi estis

lernanta en iu virina kolegio en Usono. Atentante pri la monda spirita civilizacio, ŝi montris tamen en siaj eseoj, ke ŝi estis arda ĉina patrioto kaj deziris servi al la patrolando per tio, kion ŝi lernis eksterlande.

Jam de ŝia knabineco ŝia politika modelo estis Sun Jatsen, amiko de ŝiaj gepatroj. D-ro Sun gvidis la ĉinan demokratian revolucion, brave batalis dekojn da jaroj kaj fariĝis fondinto de la unua ĉina respubliko. Post nelonge Yuan Shikai, subtenate

de la fremdlandaj fortoj, uzurpis la fruktojn de la revolucio. Kiam Song Qingling decidis kunigi sian vivon kaj sorton kun tiu de Sun Jatsen, li estis en Tokio sub minaco de ekzilo. En 1915 ŝi fariĝis lia edzino kaj intima kunbatalanto. Ŝia decido estis oponata de ŝia familio kaj kalumniita de religiaj fanatikuloj kaj politikaj malamiko.

En la sekvantaj dek jaroj ŝi, konstante ĉe la flanko de Sun Jatsen, sin okupis pri konfidenca kaj ekstera korespondo. Ŝi havis intensan laboron kaj streĉan kaj danĝeran vivon en Japanio (kie ili tenis intimajn rilatojn kun hindaj kaj koreaj porsendependaj batalantoj per dumviva sindediĉo al libereco de subpremataj popoloj), en Shanghai kaj en Guangzhou (Kantono). Post pluraj malsukcesoj en la lasta urbo, Sun Jatsen fine sukcesis establi en 1924 politikan kaj militan bazon por la ĉina revolucio. La kerno de tiu bazo inkluzivis, krom Kuomintango de Sun Jatsen, ankaŭ la ĵus fonditan Komunistan Partion de Ĉinio. Ĝi sin gvidis ne nur per la leciono de ĉina propra revolucia batalo kaj ĝia malsukceso, sed ankaŭ per la sukceso de la Oktobra Revolucio de Rusio por elhaki novan vojon. Ĝi venis post la marksisma analizo de Lenin pri la moderna mondo, ke la imperiisma regado kaj rabado de kolonioj kaj duonkolonioj (kiel Ĉinio) kunligiĝas kun la eksplua-



En 1951, kamaradino Song Qingling akceptis la Internacian Premion de Stalin por Plifortigo de Mondpaco de 1950. Ŝi donacis la tutan sumon de premio por disvolvi la bonstaton de la ĉinaj infanoj kaj virinoj.

tado de la monopola kapitalo de la industrie avangardaj landoj al la laboristoj enlandaj, tial interligiĝas ankaŭ la naciaj kaj sociaj revolucioj de diversaj landoj. Sun Jatsen komprenis tiun veron precipe en siaj lastaj jaroj kaj sin bazis sur ĝi. Neniu el liaj proksimuloj sin dediĉis al tiu vero pli multe ol Song Qingling.

En 1925, por serĉi ĉiujn unuigeblajn fortojn por la ĉina nacia liberiĝo, Sun Jatsen vojaĝis al Beijing (Pekino) kaj mortis tie de kancero. Song Qingling proklamis al la mondo liajn lastajn vortojn al liaj samlandanoj. Nelonge poste, en sia nomo ŝi kondamnis la kuomintangajn destruktrulojn kiel forlasintojn de la principoj de Sun Jatsen. Reveninte al Guangzhou, ŝi sin jetis en preparadon de la revolucia Norden-Ekspedicio de 1926-1927, por venki la reaciajn militaristojn subtenatajn de imperiismaj landoj kaj gajni nacian egalecon kaj socian progreson de Ĉinio.

Anna Louise Strong, fama usona ĵurnalistino, tiam priskribis Song Qingling per jenaj vortoj: "Kvankam en maniero ĝentila, preskaŭ mola, ŝi havas karakteron feran . . . Ŝi neniam ŝanceliĝis en sia fido al la revolucio antaŭvidita de d-ro Sun Jatsen. Ŝi tenis lian volon pri kunlaboro kun komunistoj kaj organizado de laboristoj kaj kamparanoj . . . Laŭeble ŝi provis kunigi ĉiujn unuigeblajn fortojn, konis ĉiun socian fronton, kaj per sorĉo de sia personeco akiris helpon eĉ de la malamikoj kaj prokrastis neeviteblajn koliziojn, tiel ke ŝi povis gajni tempon de spirado por la nordenmarŝo de la revoluciaj armeoj."

En 1927, la laborista ribelo liberigis Shanghai el sub la re-

Kamaradino Song Qingling



gado de la militaristoj kaj malfermis la vojon por la armeoj el la sudo, kaj tio antaŭdiris la triumfon de la nordenmarŝo. Ĝuste en tiu tempo Jiang Jieshi (Ĉiang Kajŝek), al kiu milita komando estis konfidita, perfidis la revolucion. Subtenate de imperiismaj kaj enlandaj reaciaj fortoj, li faris faŝistan buĉadon al komunistoj, sindikataj laborantoj, progresemaĵ intelektuloj kaj studentoj. Post nelonge aliaj kuomintangaj politikistoj kaj oficiroj en Wuhan (Vuhan) sekvis lin. Ili mortigis sennombrajn membrojn de kamparanaj organizoj, kiuj leviĝis por kontraŭbatali bienulan subpremado kaj helpi la revoluciajn armeojn.

Tiam Anna Louise Strong raportis, ke "Song Qingling

rifuzis lasi la nomon de Sun Jatsen kovri tian perfidon. . . , rompis kun sia propra partio por la komunistoj, la kamparanoj kaj la laboristoj". Kaj, oni devas aldoni, por la estonteco de la tuta Ĉinio.

Ne estas mirinde, ke kiam la revoluciaj trupoj en Nanchang (Nanĉang), rifuzinte sekvi la perfidulojn, leviĝis en aŭgusto de 1927, sub la gvido de Zhou Enlai, Zhu De kaj aliaj por armeo-fondo, post sia kuniĝo kun la trupoj de la Aŭtun-rikolta Leviĝo gvidataj de Mao Zedong, kiuj poste fariĝis la Ĉina Ruĝa Armeo kaj pli poste la Popola Liberiga Armeo, la nomo de Song Qingling estis en la komitato kiun ili proklamis por uzi revolucion politikan aŭtoritaton.

ETERNAN GLORON AL K-DINO

SONG QINGLING

LA 29-an de majo, 1981 forpasis kamarinano Song Qingling en Beijing (Pekino), en sia aĝo de 90 jaroj, pro kronika limfocita leŭkemio. Ŝi estis unu el la fondintoj de la Ĉina Popola Respubliko, ĝia honora prezidantino, famkonata granda batalantino patriotisma, demokratia, internaciisma kaj komunisma kaj pioniro longe hardita en la afero por defendi mondpacon.

Ekde siaj junaj jaroj ŝi sekvis grandan revoluciulon d-ro Sun Jatsen en la demokratia revolucia afero. En 1915 ŝi edziniĝis al li kaj fariĝis lia intima kunbatalantino kaj konfida asistantino. Post lia morto ŝi firme praktikis la de li ellaboritajn politikojn de unuiĝo kun Rusio kaj la Kompartio kaj helpo al la kamparanoj kaj laboristoj kaj bone kunlaboris kun la Komunista Partio de Ĉinio. En la granda batalo por la popola demokratio kaj la liberiga afero de la ĉina popolo kaj batalo kontraŭ la agreso de la japana imperiismo, ŝi ĉiam firme staris ĉe la flanko de la popolo kaj donis al ĝi grandan subtenon ĉiuf flankan. Post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko ŝi funkciis kiel vicprezidantino de la Centra

Popola Registaro, vicprezidantino de la Ĉina Popola Respubliko kaj vicprezidantino de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso.

En la longa tempo k-dino Song Qingling faris brilajn kontribuojn al la ĉina revolucio kaj konstruado kaj kondukis fruktodonan batalon kontraŭ agreso kaj por mondpacon, progreso de la socio kaj feliĉo de la homaro. Tial ŝi akiris sinceran respekton kaj amon de diversnaciecaj popoloj de Ĉinio kaj estis estimata de en- kaj eksterlandaj personoj kaj rigardata kiel unu el la plej grandaj virinoj en la 20-a jarcento.

Ŝi ĉiam sekvis la paŝojn de la historio en sia antaŭenmarŝado kaj transformiĝis de granda revolucia demokrato en grandan komuniston. Nelonge antaŭ sia forpaso ŝi aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio kiel ĝia plenrajta membro kaj per tio efektiviĝis sian deziron en longa tempo.

Post ŝia morto la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso kaj la Ŝtata Konsilantaro


Poste sekvis la enlanda milito de 1927-1937.

En ĝiaj unuaj du jaroj, Song Qingling estis en Sovetunio kaj Francio. Tiutempe ŝi estis unu el la eminentuloj en la Kontraŭimperiisma Ligo kun stabo en Bruselo. Poste, ŝi revenis al Shanghai. La reĝimo de Jiang Jieshi, esperante silentigi ŝin per mielaj vortoj, agnoskis ŝian pozicion en la Centra Plenuma Komitato de Kuomintango. Tamen ŝi forte riproĉis Jiang Jieshi

pro lia militemo kontraŭ la popolo kontraste kun lia nerezisto al la japana invado, kiu komenciĝis en septembro de 1931 per la okupado de la ĉinaj nordorientaj provincoj.

En 1932, Song Qingling aktive subtenis la batalon de la 19-a-voja Armeo, kiu brave rezistis al la bone ekipitaj japanaj trupoj en Shanghai, kaj helpis ĝiajn vunditojn. Post tio, ŝi jetis sin en la laboron de la Ĉina Ligo por Homaj Rajtoj, forte oponis kon-

traŭ la persekutado de Kuomintang al la popolo, publike helpis politikajn malliberulojn kaj persistis en batalo, eĉ kiam ŝiaj intimaj kamaradoj estis kaŝe mortigitaj kaj ŝi mem estis minacata. Ŝi oponis kontraŭ ne nur la enlanda, sed ankaŭ la monda faŝista minaco. Ŝi riproĉis la persekutadon de Hitler al la germanaj progremuloj kaj la judoj. Ŝi faris paroladon en la duonsekrete internacia Kontraŭmilita Kongreso en Shanghai por oponi la kreskantan minacon de



La funebra halo de kamaradino Song Qingling

decidis okazigi por ŝi nacian entombigon. Ekde la 31-a de majo ĝis la 2-a de junio 120,000 personoj el diversaj rondoj de Beijing venis en la kondolencan salonon de la Popola Halo rigardi ŝiajn restaĵojn kaj karmemori ŝiajn brilajn kontribuojn por la revolucio. Vespere de la 2-a de junio miliono da ĉefurbanoj staris ambaŭflanke de la strato, kaj adiaŭis ŝiajn restaĵojn, kiuj estis veturigataj al la kremaciejo. Je la kvara horo posttagmeze de la 3-a de junio ĉ. dekmil reprezentantoj el diversaj rondoj de la ĉefurbo ĉeestis

ŝian funebran ceremonion en la Popola Halo, en kiu Deng Xiaoping, vicprezidanto de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, faris funebran paroladon.

Laŭ la deziro de k-dino Song Qingling, ŝia cindro estis entombigita en la tombejo de ŝiaj gepatroj, en Shanghai (Ŝanhajo).

K-dino Song Qingling eterne vivos en la memoro de la diversnaciekaj popoloj de Ĉinio!

agreso. Ŝi laŭdis Respublikan Hispanion. Ŝi kuraĝigis la studentojn en Beijing kaj aliaj ĉinaj urboj, kiuj spitis armitan subpremado por postuli reziston kontraŭ Japanio anstataŭ internan militon. Ŝi sidis en la kortumo vizaĝe al la kuomintangaj juĝistoj, kiam ili akuzis 7 gvidantojn en la patriota nacisava movado, kaj ŝi petis la tribunalon fermi ŝin ankaŭ pro la "krimo de patriotismo".

En 1936, post la sukcesa Longa Marŝo de la Ĉina Ruĝa Armeo,

kiam Jiang Jieshi estis malliberigita de trupoj en Xi'an(Hi'an), kiuj postulis reziston kontraŭ Japanio kaj ĉesigon de interna milito, Song Qingling estis unu el tiuj, kiuj helpis liberigi lin je lia promeso efektiviĝi ilian postulon. Lia promeso ne povis esti fidata, sed vizaĝe al la kulminanta tutlanda premado li ne povis tute forlasi sian promeson.

Finiĝis la dek-jara interna milito. La 7-an de julio, 1937, la japana armeo atakis Lugouqiao apud Beijing, kaj komenciĝis la

Kontraŭjapana Rezistmilito de Ĉinio.

Dum la ok-jara rezistmilito (1937-1945) Song Qingling sin dediĉis al du laboroj — konservo kaj fortigo de la nacia unuecfronto kaj egala traktado de ĉiuj kontraŭjapanaj fortoj. Ŝi iniciatis kaj gvidis la Ĉinio-defendan Ligon kun ĉinaj kaj fremdlandaj membroj kaj laboris unue en Hongkong kaj poste en Chongqing (Ĉongking) por mobilizi internacian opinionon kaj akiri helpon.

Ŝi rigardis la novan kunlaboron inter Kuomintango kaj la Komunista Partio sur la bazo de patriotismo kaj demokratio kiel reviviĝon de heredaĵo de Sun Jatsen. Ŝi akklamis ĝian komencon progreson kaj sonorigis la alarmon, kiam la reĝimo de Jiang Jieshi intencis disrompi ĝin.

La ligo kolektis medicinajn kaj aliajn provizojn el diversaj landoj kaj transportis ilin ĉefe al la kontraŭjapanaj bazlokoj gvidataj de la Komunista Partio en la malamika malfronto, kontraŭ kiuj Kuomintango faris ĉirkaŭadon kaj blokadon.

Post la Dua Mondmilito, kiam Jiang Jieshi kun forta subteno de Usono, kiun plejparto de la usonanoj hodiaŭ rigardas kiel eraran, refoje faris internan militon, Song Qingling daŭrigis en Shanghai la laboron de la Ĉinio-defenda Ligo, kiu tiam prenis al

si novan nomon la Ĉina Bonstatiga Fonduso. Ĝia ĉefa tasko estis doni helpon por patrino kaj infana sano, kulturo kaj eduko (inkluze la unuan ĉinan infanan teatron) en Shanghai, kie koncentriĝis la laborista klaso.

Sub la gvido de Song Qingling, la Ĉina Bonstatiga Fonduso estis ankaŭ trejna lernejo. Ĝia spirito estis tiu de la liberigitaj regionoj, ĝia ekzemplo estis elokventa kontrasto kun korupto-ŝarĝita laboro de Kuomintango por "helpo", ĝia personaro kaj la gejunuloj, kiujn ĝi servis, esperis la venontan liberiĝon kaj sin preparis por transpreni Shanghai en 1949.

Post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, Song Qingling servis kiel ĝia vicprezidanto kaj vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso. Ŝi laboris en la plej altaj konsilantaroj de la ŝtato.

La 8-an de majo, 1981 d-ro Howard Petch, estro de la Universitato de Viktorio de Kanado, donis al kamaradino Song Qingling la titolon kaj diplomon de honora doktoro pri juro en la nomo de la universitato.



Ŝi, kiel reprezentanto de la registaro kaj popolo, multfoje faris vizitojn al fremdaj landoj. Ŝi daŭre sin okupis pri la unuecfronta laboro enlande kaj internacie. Ŝiaj verkoj, pli multaj ol antaŭe, estis plenaj de ĝojo de la konstruado de nova socio. Kaj ŝiaj sociaj bonstatigaj aktivecoj daŭris en la Ĉina Bonstatiga Instituto, kiu heredis la tradicion de la Ĉinio-defenda Ligo informi al la amikoj en la mondo, kion la ĉina popolo faras kaj pensas, en la monata gazeto «Ĉinio en Konstruado», distribuata tutmonde en sep lingvoj, por kiu ofte verkis Song Qingling.


Unuvorte, Song Qingling ĉiam staris por unuigo de plej multaj homoj kaj fortoj sur la vojo por antaŭenmarŝo. Ŝi neniam postulis, ke ĉiuj akordiĝu en ĉiuj vidpunktoj aŭ iru per egalaj paŝoj. Sed ŝi ne toleris tiujn, kiuj returnas la horloĝan montrilon aŭ turnas publikajn interesojn en sian personan profiton. En Ĉinio kaj la tuta mondo ŝi havis multajn amikojn kaj tenis kun ili vastajn kaj konstantajn kontaktojn. Ĉiu, kiu laboris kune kun ŝi, konas ŝian demokratian kaj modestan spiriton. Ŝi havis neniom da altrangula maniero. Ŝi ĉiam estis diligenta kaj atente — kiam ŝi respondis leteron, ŝi tion faris en la sama tago aŭ la sekvanta tago eĉ kiam ŝi estis okupita aŭ malsaneta.

De sia knabineco ĝis hodiaŭ, kun sperto kaj saĝo tre riĉa ŝi ĉiam estis la sama persono patriota, ĝust-opinia, malproksimvida, principo-tena, spontanea, humura kaj varma.

** Israel Epstein iam aliĝis al la Ĉinio-defenda Ligo kaj nun funkcias kiel ĉefredaktoro de la gazeto «Ĉinio en Konstruado».*



Song Qingling studis en Wesleyan-universitato en Macon, Usono, en 1908 kaj revenis al Ĉinio en 1913 kun la titolo de licenciulo. Ŝi estas en licenciula robo.



D-ro Sun Jatsen kun sia edzino Song Qingling, en Japanio, 1915


Song Qingling, honora prezidanto de la Ĉina Popola Respubliko



Sun Jatsen (la 5-a de maldekstre en la fronto) kaj lia edzino Song Qingling (la 4-a de maldekstre en la fronto) kaj aliaj kunvenis en Tokio en 1916 por kondamni Yuan Shikai, reprezentanton de imperiismo kaj feŭdismo en Ĉinio. En la foto estas Liao Zhongkai (la 2-a de maldekstre en la posta vico), He Xiangning (la 3-a de dekstre en la fronto) kaj Liao Mengxing (la 2-a de maldekstre en la fronto). La knabo antaŭ d-ro Sun Jatsen estas Liao Chengzhi.




Je la 17-a de februaro 1933 Song Qingling donis bankedon honore al la fama brita verkisto George Bernard Shaw en sia hejmo. De maldekstre en la fronto: usona ĵurnalisto Agnes Smedley, ĉina eminenta edukisto Cai Yuanpei kaj granda ĉina verkisto Lusin. De maldekstre en la posta vico: George Bernard Shaw, Song Qingling, usona ĵurnalisto Harold Isaacs kaj moderna prozisto Lin Yutang.



Song Qingling kaj infanoj de legoscia klaso funkciigita de la Ĉina Bonstatiga Fonduso en 1947

Song Qingling ekzamenas medicinaĵojn kaj aliajn materialojn kolektitajn de la Ĉina Bonstatiga Fonduso, antaŭ ilia transportiĝo al la liberigitaj regionoj sub la regado de la Komunista Partio de Ĉinio, en 1948.

La Ĉina Bonstatiga Fonduso, origine nomata la Ĉinio-defenda Ligo, estis popola organizo iniciatita de Song Qingling en junio de 1938 en Hongkong kaj gvidata de ŝi. Kiam ĝi translokiĝis al Shanghai en novembro de 1945, ĝi prenis al si alian nomon la Ĉina Bonstatiga Fonduso kaj poste alinomiĝis la Ĉina Bonstatiga Instituto en aŭgusto de 1950.





En septembro de 1949, kamaradino Song Qingling ĉeestis la Unuan Plenan Sesion de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco en Beijing kiel speciale invitita reprezentanto. En la kunveno ŝi estis elektita kiel vicprezidanto de la Centra Popola Registaro de la Ĉina Popola Respubliko.



Kamaradino Song Qingling prenis manĝon kune kun laboristinoj dum sia inspektado de la Shanghai-a 17-a Ŝpinteksa Fabriko en oktobro de 1958.



En novembro de 1957 kamaradino Song Qingling ĉeestis la celebradon de la 40-a datreveno de la Oktobra Socialisma Revolucio en Moskvo kune kun prezidanto Mao Zedong. La foto montras ŝian intervidiĝon kun la edzino de Kalinin (dekstre) kaj la edzino de Borodin (maldekstre) en Moskvo.





Song Qingling, Zhou Enlai, Chen Yi kaj aliaj k-doĵ vizitis Srilankaon en februaro de 1964.

Kamaradino Song Qingling en laboro



Ekonomiaj Atingoj de Ĉinio en la Pasintaj 30 Jaroj

POST la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, la socialisma ekonomia konstruado de Ĉinio trapasis zigzagan vojon. En la komenca periodo de la 50-aj jaroj ĝi disvolviĝis glate, tamen en la posta periodo ĝi renkontis malfacilegojn. En la ĥaosa kultura revolucio de 1966 ĝis 1976 la produktado en ĉiuj flankoj suferis gravan detruadon, kaj la naciekonomia konstruado de Ĉinio ne atingis la difinitan nivelon. Malgraŭ tio, la socialisma konstruado de Ĉinio atingis grandan sukceson en la pasintaj 30 jaroj.


STARIGO DE LA SOCIALISMA PUBLIKA POSEDSISTEMO


La fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko en 1949 ebligis al Ĉinio transiri de la novdemokratia revolucio al la socialisma revolu-

cio. En la unuaj 3 jaroj la ĉina popolo plenumis la Agraran Reformon, abolis la sistemon de feŭda ekspluatado, resanigis la vundojn de longtempa militado kaj levis la nacian ekonomion ĝis la plej alta nivelo en la historio de la malnova Ĉinio.


Poste, la popola registaro efektivigis la socialisman transformon al agrikulturo, metia industrio kaj kapitalismaj industrio kaj komerco, starigis la socialisman publikan posedsistemon de produktaj rimedoj, abolis la ekspluatatan sistemon kaj praktikis la socialisman distribuan principon “de ĉiu laŭ lia kapablo, al ĉiu laŭ lia laboro”, tiel ke la ĉina popolo, kiu konsistigas preskaŭ kvaronon de la monda loĝantaro, eniris en la socialisman socion. Tio estas la plej profunda ŝanĝo de la ĉina historio.

*La centra telegvidejo de Liujiaxia-
hidroelektrejo ĉe la Flava Rivero*





Altprodukta oleputo borita en Bohai-marano en kunlaboro de Ĉinio kaj Japanio



Ministoj de la Huaibej-a Karbominejo kolektas karbon per maŝino.

En la pasintaj 30 jaroj, la ekonomio de tutpopola posedanteco kaj tiu de kolektiva posedanteco havis grandan disvolviĝon.

La ekonomio de tutpopola posedanteco kun absoluta supereco okupis firman gvidan lokon en la nacia ekonomio. La produktov valoro de la industrio de tutpopola posedanteco konsistigis 26% de la totala industria produktov valoro en 1949 kaj tiu en 1979 konsistigis 81%. Kaj la nombro de laboristoj kaj oficistoj en la entreprenoj de tutpopola posedanteco estis 76,930,000 en 1979, t.e. 9.6-oble kiom tiu en 1949.

Ankaŭ disvolviĝis la industrio de kolektiva posedanteco. Ĉe la fino de 1979 estis 100,000 industriaj entreprenoj de kolektiva posedanteco en la ĉinaj urboj. Ili konsistigis 28.1% de la totala nombro de industriaj entreprenoj de la lando. Ili havis 22,735,000 laboristojn, kiuj konsistigis 22.8% de la totala nombro de laboristoj de la lando. Ilia totala produktov valoro atingis 63.72 miliardojn da juanoj, kiuj konsistigis 13.9% de tiu de la tutlanda industrio.

La agrikulturo de kolektiva posedanteco jam fariĝis ĉefa en la agrikultura produktado. La agrikultura kolektiva ekonomio de Ĉinio trapasis ĉefe kvar etapojn de disvolviĝo: interhelpa grupo, elementa kooperativo, altgrada kooperativo kaj popolkomunumo. En 1979, en la ĉina kamparo estis pli ol 53,000 popolkomunumoj kun ĉ. 800,000,000 loĝantoj (el kiuj


troviĝis pli ol 300,000,000 homoj kun labora forto). Escepte de la parceloj por privata uzo (kiuj konsistigis 6% de la totala areo de agraro en 1979), ĉiuj agroj estis kolektive mastrumataj kaj la ĉefaj agrikulturiloj apartenis al la kolektivo.

Nun, en la situacio ke la ekonomio de la socialisma publika posedsistemo havas absolutan superecon, la ŝtato permesas ekzistadon kaj disvolviĝon de iuj branĉoj de individua ekonomio, kiuj servas kiel necesa aldono por la socialisma ekonomio, kaj la areo de parceloj por privata uzo povas konsistigi 7-15% de la totala agraro. Tio helpas disvolvi la aktivecon de la kamparanoj por produktado kaj helpas disvolvi la nacian ekonomion.

DISVOLVIĜO DE LA INDUSTRIA KAJ AGRIKULTURA PRODUKTADO

Kun la stariĝo kaj disvolviĝo de la socialisma sistemo, la industria kaj agrikultura produktado de Ĉinio akiris disvolviĝon en la pasintaj 30 jaroj. La totala industria kaj agrikultura produktov valoro de 1979 multiĝis 14-oble pli ol tiu de 1949.

En la pasintaj 30 jaroj, la popola registaro multe klopodis por plibonigi la kondiĉojn de agrikultura produktado kaj grandskale faris la fundamentan kampan kaj irigacian konstruadon. Oni reformis sume 260 milionojn da muoj (1 muo=1/15 hektaro) da malaltaj kaj facile inundablaj kampoj kaj 60 milionojn da




muoj da sal-alkalaj kampoj kaj konstruis pli ol 84,000 grandajn kaj malgrandajn akvorezervejojn kun totala kapacito de 400 miliardoj da kubmetroj. La areo de la irigaciataj kampoj de la lando pligrandiĝis de 300 milionoj da muoj en 1952 al 670 milionoj da muoj, kiuj konsistigas 45% de la totala areo de la agraro. Ambaŭborde de la riveroj Changjiang (Janzi-rivero), Huanghe (Flava Rivero), Huaihe, Haihe, Zhujiang (Perlo-rivero) k.a., oni riparigis kaj konstruis digojn longajn je 165,000 kilometroj, dragis kaj kreis pli ol 100 grandajn drenajn kanalojn. Dank' al tiuj konstruaĵoj la inundo de tiuj riveroj estas bridita ĝenerale.

Ankaŭ la agrikultura meĥanizado havis certan disvolviĝon. Antaŭ la Liberiĝo, en la kamparo de Ĉinio estis preskaŭ nenia moderna agrikultura maŝino. Ĉe la fino de 1979, en la tuta kamparo troviĝis agrikulturaj maŝinoj kun movforto de 180 milionoj da ĉevalpovoj, inter kiuj la movforto de la drenaj kaj irigaciaj maŝinoj estis 71,221,000 ĉevalpovoj, 667,000 grandaj kaj mezgrandaj traktoroj kaj 1,671,000 mantraktoroj. La areo de la maŝinplugitaj kampoj atingis 630 milionojn da muoj, t.e. 42.4% de la totala areo de la agraro. Antaŭ la Liberiĝo, oni preskaŭ ne uzis kemian sterkon, sed en 1979, por ĉiu muo da kampo oni uzis meznombre 7 kilogramojn da kemia sterko. Antaŭ la Liberiĝo, en la ĉina kamparo preskaŭ ne estis elektro, sed en 1979 la konsumkvanto de elektro en la kamparo atingis 28.3 miliardojn da kilovatt-horoj, t.e. 10% de



Silkaj tapiŝoj de Pinghu, Zhejiang-provinco



Riĉa rikolto de tritiko en la Granda Sovagejo en nordorienta Ĉinio

la totala produktokvanto de elektro de la lando. Nun en pli ol 1,500 gubernioj el la pli ol 2,100 gubernioj de la lando oni jam konstruis malgrandajn hidroelektrejojn.

La pliboniĝo de la agrikulturaj produktaj kondiĉoj akcelis la disvolviĝon de la agrikultura produktado, kaj tiel solviĝis la problemoj de manĝaĵoj kaj vestoj por miliardo da ĉinaj loĝantoj. En 1979 la totala produktovaloro de agrikulturo de Ĉinio atingis 158,400,000,000 juanojn, t.e. 3.7-oble kiom tiu en 1949. Ĉi-sube mi prezentas kreskon de la produktokvanto de iuj ĉefaj produktajoj en la pasintaj 30 jaroj:

	1949	1979
greno	113,200,000 tunoj	332,115,000 tunoj
kotono	445,000 tunoj	2,207,000 tunoj
oledonaj plantoj	2,564,000 tunoj	6,435,000 tunoj
sukerdonaj plantoj	2,833,000 tunoj	24,614,000 tunoj

En la pasintaj 30 jaroj, Ĉinio starigis relative kompletan industrian sistemon. En 1977, Ĉinio havis 400,000 entreprenojn industriajn kaj trafikajn kaj ĝia industria fiksita aktivo kreskis 29.7-oble kompare kun tiu en 1949.

Ankaŭ la industriaj branĉoj estis relative kompletaj. Rapidan disvolviĝon akiris la

malnovaj industriaj branĉoj fer-ŝtala, karba, elektra kaj tekstila, kaj ankaŭ multaj novaj industriaj entreprenoj de minaj, metalurgiaj kaj elektraj ekipaĵoj, precizaj maŝinoj kaj traktora, aŭta, aviadila, petrol-kemia kaj elektronika industrioj. Dank' al disvolviĝo de la petrolo industrio, Ĉinio efektivigis memsufiĉecon en petrolo en la 60-aj jaroj. Nun Ĉinio fariĝis la 9-a ĉefa lando en produktado de petrolo.

La industrio de la malnova Ĉinio koncentriĝis ĉefe en malmultaj grandaj urboj apudmaraj. Nun en la internaj regionoj, mezgrandaj kaj malgrandaj urboj kaj naci-malplimultaj regionoj, kies industrio estis postiĝinta antaŭe, jam konstruiĝis nombro da novaj industriaj bazoj, kiuj akcelis la disvolviĝon de la ekonomio de tiuj regionoj.

Rapide disvolviĝis la industria produktado. En 1979, la totala industria produktovaloro de Ĉinio estis 495.1 miliardoj da juanoj, t.e. 51.5-oble kiom tiu en 1949, kun meznombra jara kresko de 13.3%. La industria produktovaloro de Ĉinio konsistigis 30% de la totala produktovaloro de ĝiaj industrio kaj agrikulturo en 1949, kaj 70% en 1979 (kalkulate laŭ prezo en respektiva jaro). La kreskado de la produktokvanto de iuj ĉefaj industriaj produktajoj montriĝas jene:



Lavmaŝinoj produktitaj de la Beijing-a Lavmaŝina Fabriko

	1949	1979
karbo	32,000,000 tunoj	635,000,000 tunoj
petrolo	120,000 tunoj	106,150,000 tunoj
elektro	4,300,000,000 kilovatt-horoj	282,000,000,000 kilovatt-horoj
ŝtalo	158,000 tunoj	34,480,000 tunoj
maŝinoj	1,600	140,000
cemento	660,000 tunoj	73,900,000 tunoj
kemia sterko	6,000 tunoj	10,654,000 tunoj
kotona ŝtofo	1,890,000,000 metroj	12,150,000,000 metroj

En multaj jaroj la strukturo de industrio de Ĉinio estis neracia, la proporcio de peza industrio tro granda kaj tiu de malpeza industrio tro malgranda kaj la agrikulturo postĝinta, tiel ke la agrikulturo, malpeza industrio kaj peza industrio fariĝis proporcie neharmoniaj. Krome, tro multa akumulo proporcie malharmoniiĝis la rilatojn inter akumulo kaj konsumo. En la lastaj du jaroj la popola registaro ĉiamaniere klopodis por reguligi proporciajn rilatojn inter diversaj branĉoj de la nacia ekonomio por ke ili konformu al la disvolvo de la nacia ekonomio.

En la industria produktado de Ĉinio ankoraŭ ekzistas problemoj de malalta produktiveco, malbona kvalito de iuj produktaĵoj, malmultaj specoj de produktaĵoj, ktp.

Kompare kun la disvolviĝintaj landoj Ĉinio estas ankoraŭ postĝinta en sciencoj kaj teknikoj, tamen ĝi jam starigis serion da novaj sciencaj kaj teknikaj fakoj. La sukcesa provo de atombombo, hidrogenbombo kaj misilo, la lanĉo kaj revenigo de sputnikoj kaj la sukceso de la artefarita sinteza bova insulino markas novan nivelon de sciencoj kaj teknikoj de Ĉinio.

PLIBONIĜO DE LA POLOLA VIVO

Kun la disvolviĝo de la socialisma ekonomio, rimarkinde pliboniĝis la popola vivo.

En 1949, ĉiu loĝanto havis meznombre 209 kilogramojn da greno, sed en 1979 jam 342 kilogramojn. Ankaŭ multiĝis laborhavaj



La unua elektrizita rizplantida flegejo kun plankareo de pli ol 930 kvadrataj metroj estis transdonita al uzado. La ses flegaj laborejoj estas aŭtomate regataj per elektro, kun procedoj de akvo-ŝprucado, fotosintezo kaj provizo de oksigeno.



Trikitaj vestoj produktitaj de la Dandong-a Trik-industria Kompanio de Liaoning-provinco

personoj. En 1979 la entreprenoj de tutpopola posedanteco kaj de kolektiva posedanteco havis sume 99,660,000 laboristojn.

La meznombra jara salajro de ĉiu laboristo en entreprenoj de tutpopola posedanteco estis

446 juanoj en 1952 kaj 705 juanoj en 1979, kun kresko de 58% (kun pura kresko de 29%).

En la kamparo la meznombra enspezo de ĉiu homo, kiu inkluzivas enspezon de parcelo por privata uzo kaj enspezon de hejmaj flankokupoj, estis 40.5 juanoj en 1957, kaj 83.4 juanoj en 1979.

Leviĝis la konsumata nivelo de la popolo. La meznombra elspezo de ĉiu homo por konsumaj varoj en 1952 estis 76 juanoj kaj 197 juanoj en 1979 (porkonsumata elspezo nete kreskis je 88%). La totala valoro de podetala vendo en 1950 estis 17.06 miliardoj da juanoj, kaj 180 miliardoj da juanoj en 1979.

La salajruloj de la ŝtataj entreprenoj, institucioj kaj administracioj kaj la studentoj de altaj lernejoj ĝuas senpagan kuracadon. En la popolaj komunumoj de la kamparo fondiĝis kuracejoj, kaj en la produktaj brigadoj efektiviĝis koopera kuracado. Dank' al pliboniĝo de la vivkondiĉoj kaj disvolviĝo de la sanprotektata afero, multe longiĝis la vivo de la ĉina popolo. La procento de mortintoj reduktiĝis de 0.8% en 1950 al 0.62% en 1979.

Resume, en la pasintaj 30 jaroj post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, ĉina

popolo atingis relative grandan sukceson en la socialisma konstruado, malgraŭ malfaciloj sur sia vojo kaj eraroj faritaj de gvidantoj. Tio montris, ke la socialisma sistemo de Ĉinio havas fortan vivipovecon kaj grandan supercon.

Ankaŭ en 1980, la industria kaj agrikultura produktado de Ĉinio havis bonajn atingojn. Sub la kondiĉo de nemultiĝo de energio, la industria produktovaloro estis 499.2 miliardoj da juanoj (kalkulate laŭ nevaria prezo de 1970), je 8.7% pli multe ol tiu de 1979, la plano estis superplenumita je 3.1%. Oni plenumis kaj superplenumis la planojn de produktado de petrolo, karbo, elektro, ŝtalo, fero, ŝtalaj materialoj kaj cemento. Venkinte troabundecon de pluvo en suda Ĉinio kaj sekegecon en norda Ĉinio, oni akiris la duan plej grandan riĉrikolton post la fondiĝo de la lando, kvankam la grena produktokvanto (318,220,000 tunoj) iom reduktiĝis kompare kun tiu de 1979. La totala produktovaloro de agrikulturo atingis 162.7 miliardojn da juanoj en 1980 (kalkulate laŭ nevaria prezo de 1970), je 2.7% pli multe ol tiu de 1979. Pliproduktiĝis ankaŭ kotonono, oledonaj kaj sukerdonaj plantoj.

Horaro de la Ĉiutaga Esperanta Disaŭdigo de Radio Pekino

Pekina Tempo	GMT	Al Regionoj	Ondoj(m)	kHz
4:00-4:30	20:00-20:30	Eŭropo	26.2	11445
			32.0	9365
			30.1	9965
6:30-7:00	22:30-23:00	Latin-Ameriko	19.7	15165
			16.9	17650
19:00-19:30	11:00-11:30	Japanio, Koreio	30.4	9860
			19.3	15510
21:00-21:30	13:00-13:30	Sudorienta Azio	25.6	11685
			19.8	15145



PLIIĜIS LA EKSPORTA KVANTO DE MANĜEBLA OLEO DE ĈINIO

Ekde 1980 la kvanto de eksportita manĝebla oleo de Ĉinio superis tiun de la importita. Krome, ĝia rezervokvanto fariĝis rekorda en la historio.

Tion oni ŝuldas al pliprodukto de la ĉinaj oledonaj plantoj en la lastaj jaroj. La totala produktokvanto de manĝebla oleo leviĝis de 1,659,000 tunoj de 1977 al 2,067,000 tunoj de 1978. La produktokvanto de manĝebla oleo de 1979 atingis 2,465,500 tunojn kaj tiu de 1980 pliiĝis ĝis 2,763,000 tunoj. Ankaŭ la oledonaj plantoj en la somero de 1981 akiris riĉan rikolton. Laŭ takso, la tiujara totala olea produktokvanto de Ĉinio superos 3,000,000 tunojn.

KRESKIS PRODUKTOKVANTO DE NAŬ SPECIOJ DE VAROJ

En la unuaj kvar monatoj de 1981 la produktokvanto de naŭ specoj de varoj de Ĉinio multe kreskis kompare kun tiu en la sama periodo de 1980. Inter ili la bicikloj, kudromaŝinoj kaj horloĝoj havis pliprodukton je almenaŭ 24%. Dum la kvar monatoj estis produktitaj 1,200,000 televidiloj kaj 14,080,000 radioriceviloj. Ili kreskis respektive je 99.7% kaj 92.9% kompare kun tiuj en la sama periodo de 1980. La pro-

duktokvanto de hejmaj lavmaŝinoj pliiĝis kvaroble. Ankaŭ tiu de la fotiloj, magnetofonoj kaj elektra ventumiloj certgrade kreskis.

NAFTO KAJ GASO TROVITAJ EN LA SUDA ĈINA MARO

Altprodukta petrol-gasa puto estis antaŭ nelonge borita en ĉina-franca kunlaboro en Beibu-golfo de la Suda Ĉina Maro. Tiu puto kun profundeco de 2,945 metroj estis borita de la ĉina putobora platformo "Nanhai n-ro 3" en marakvo 27.5 metrojn profunda. La Filia Sudmara Kompanio de la Ĉina Petrola Kompanio kaj la Totala Petrola Kompanio de Francio kune anoncis, ke ili trovis du tavolojn riĉajn je nafto kaj gaso. La dua tavolo ĉiutage donas 320 tunojn da nafto kaj 59,000 kubmetrojn da natura gaso, kaj la tria tavolo ĉiutage donas 320 tunojn da nafto kaj 70,000 kubmetrojn da natura gaso.

NOVA HIDROELEKTREJO EN ĈINIO

Tianqiao-hidroelektrejo en Shanxi (Ŝanhi)-provinco ĉe la meza parto de la Flava Rivero finkonstruiĝis lastatempe kaj komencis produkti elektron. Ĝi estas mezgranda hidroelektrejo kun totala generatora kapacito de 128,000 kilovattoj. Ĝia baraĵo longas 772 metrojn kaj altas 49.7 metrojn. La baraĵo povas rezervi 67,000,000 kubmetrojn da akvo kaj baras akvon de la Flava Rivero, tiel ŝanĝis la supran valon en artefaritan lagon longan je 20

kilometroj, kiu povas reguligi la riverakvon. Ĝia elektro estas liverata al urboj kaj vilaĝoj en la nordaj partoj de Shanxi kaj Shaanxi (Ŝenhi), pere de ok alttensiaj transsendaj lineoj.


LA UNUA PRODUKTA LINIO DE FLOSA VITROFARADO

La ŝtata scienca kaj teknika komisiono aprobis la teknologion de flosa vitrofarado en ĝia kvalitatoksa kunveno en Luoyang, je la 30-a de aprilo. Tiu teknologio povas grandkvante kaj stabile produkti platajn vitrojn de malsamaj dikecoj de 3 ĝis 12 milimetroj kaj la kvalito de la produktajoj estas multe pli bona ol tiu de la produktajoj per aliaj metodoj. La proceso povas altigi la produktivon kaj redukti la laborintensecon. Internacie ĝi estis rigardata kiel revolucio de la industrio de plataj vitroj.

NAFTO KAJ GASO TROVITAJ EN BOHAI-MARO

En kunlaboro de Ĉinio kaj Japanio por ekspluati nafton en Bohai-mar, antaŭ nelonge oni elboris altproduktan nafto-gasan puton, el kiu elŝprucis 1,000 tunoj da oleo ĉiutage. La fakuloj asertas, ke tio prezentis bonan perspektivon por serĉi nafton kaj gason en Bohai-mar.

Ĝi estas la unua oleputo kun profundeco de 3,334.5 metroj borita de la ĉina putobora platformo "Bohai n-ro 6" laŭ kontrakto. La nafta kaj gasa stratomo de la puto estas pli ol 300 metrojn dika.



* Herbert Hofmann, Esperanto-pioniro, serĉas korespondamikojn precipe en Ĉinio, sed ankaŭ el aliaj landoj. Intereso: Pm. belaj artikaj vidaĵ-kartoj, fotoj ktp. Adr.

Schisslerstr. 15, D-8900 Augsburg, Okcid. Germanio.

* Wolfgang Schwanzer, AM HOHEN WEG 30, 6000, Frankfurt 90, FR Germanio, 25-j. studento de geografio ŝatas korespondi kun ĉina junulo aŭ junulino kaj interesiĝas pri fotado, vojaĝo, lego, politiko ktp.

* Mi estas 25j. instruisto. dez. kor.

kun alilandaj kolegoj de elementlernejoj kaj gimnazioj kaj amatorfarmakologoj. Adr.: Zhang Jinghai, Shi San Ye, Zhi Gong Jiao Yu Chu, 030009 Taiyuan, Shanxi, Ĉinio.

* MARIOLA MAJ, UL. Pereca 21/27, 53-443 Wroctaw, Pollando, 18-j. lernantino interesiĝas pri muziko, kino, interŝanĝas bildkartojn, librojn kaj kolektas fotojn de kanzonistoj.

GRATULON AL LA 66-a UNIVERSALA KONGRESO

EKDE 1905 la Universala Kongreso de Esperanto okazis 65 fojojn, kun partopreno de esperantistoj el 40-50 landoj, kaj la nombro de kongresanoj iafoje superis 4,000. Tio klare montris la vivipovon de Esperanto kiel praktikebla internacia lingvo. Tamen la kongresoj plejparte havis lokon en Eŭropo, trifoje en Usono kaj nur foje en Japanio. Tio montras, ke Esperanto ankoraŭ ne estas egale bone disvastigita en ĉiuj partoj de la mondo.

La 66-a Universala Kongreso en Brazilio estas la unua, kiu havos lokon en la suda hemisfero. Tio signifas ke nia lingvo ekmarŝas en la trian mondon, inkluzive de Latin-Ameriko. Pro tio, la ĉijara kongreso ja havas signifon neignoreblan kaj tiu ĉi U.K. estos certe enskribita en la historion de la monda Esperantomovado kiel grava kongreso.

Esperanto jam diskoniĝis en pluraj latinamerikaj landoj, precipe en nia kongreslando Brazilo. Pasintjare okazis en Argentino la Unua Tutamerika Esperanto-kongreso kaj ĉijare okazos la Universala Kongreso en Brazilo, alia grava lando de Latin-Ameriko. Sendube, nia lingvo multe pli disvastiĝos en Latin-Ameriko post tiuj du kongresoj.

Ni ĉinaj esperantistoj ĉiam rigardas Esperanton kiel instrumenton por komuniki internacie kaj akceli la amikecon inter diversaj popoloj. Lastjare, en la Stokholma Kongreso, la Ĉina Esperanto-Ligo estis akceptita kiel aliĝinta landa asocio de UEA. Tiam nia delegito sincere deklaris, ke ni plifirmigos niajn rilatojn kaj kunlaboron ne nur kun UEA sed ankaŭ kun E-asocioj kaj fakaj E-organizaĵoj de diversaj landoj. En la pasinta unu jaro, ni fruktodone kunlaboris kun UEA kaj ankaŭ starigis intimajn rilatojn kun esp-istoj kaj Esp-organizaĵoj de multaj landoj. Kompreneble ni esperas ke ni akiros pli kaj pli multajn amikojn inter la esp-istoj de la latinamerikaj landoj kaj dank' al ilia helpo nia revuo El Popola Ĉinio trovos pli multajn abonantojn en tiuj landoj.

Ni donas grandan atenton al kaj havas sinceran esperon pri la ĉi-foja kongreso. Pri ĝi ni plurfoje raportis en nia revuo kaj en la Esperanto-programo de Radio Pekino, dezirante al ĝi plenan sukceson. Ni publikigis en nia gazeto artikolon kaj fotojn pri Brazilo kaj Brazilio. Ni faris tre malmulte, tamen tio montris nian sinceran subtenon al la kongreso.

Ĉijare al la kongreso ni sendos kvar-personan delegacion kun veterana esperantisto kaj lingvisto Chen Yuan, vicprezidanto de ĈEL, kiel sia estro. Li faros fakan prelegon en la Internacia Kongresa Universitato. En nia delegacio estos ankaŭ Ĉ. Ĉen, ĝenerala sekretario de ĈEL kaj membro de la Komitato de UEA. Dum la kongreso li ĉeestos la sesion de la Komitato de UEA. Krom partopreni en la aktivecoj de la kongreso, nia delegacio ankaŭ diskutos kun UEA-estraro pri nia estonta kunlaboro, kaj kompreneble ni ankaŭ disvolvos amikajn rilatojn kun esp-istoj kaj Esp-organizaĵoj de diversaj landoj. Ni sincere deziras ke la kongreso multe plifortigu la amikecon inter ni kaj la samideanoj de latinamerikaj landoj, precipe tiuj de Brazilo.

Kun alta estimo ni salutas al prezidanto de Brazilo, la alta protektanto de la kongreso!

Ni salutas al la loka komitato de la kongreso kaj ni sendas pere de ĝi niajn bondezirojn al la brazilaj samideanoj kaj popoloj!

Plenan sukceson al la kongreso!

**Ĉina Esperanto-Ligo
Redakcio de EPC**



Generala sekretario de UEA F. Szabo-Felso (la tria de dekstre) en la Shanghai-a Jadaĵ-Fabriko

Memorinda vojaĝo

Februo 1978 - Februo 1978

ESTIS grava evento, ke en 1978 post longa paŭzo reaperis la ĉina delegitaro en la Universala Kongreso. La intenco de Ĉina Esperanto-Ligo denove partopreni la internacian movadon estis unuanime salutata en UEA. Tiel rekte kondukis la vojo al la stokholma komitata decido pri la akcepto de ĈEL kiel plenrajta landa asocio de UEA. Mi sentis min persone honorigita, kiam pasintaŭtune mi ricevis la oficialan inviton de ĈEL por viziti Ĉinion kaj trakti pri la plua kunlaboro inter UEA kaj la ĉinaj esperantistoj.


Laŭ mia prijuĝo la interparoloj dum la vizito en Ĉinio montris, ke oni povas multon atendi de tiu ĉi kunlaboro. La unua konkreta rezulto estis la presigo de Plena Analiza Gramatiko, kies unuaj ekzempleroj jam en decembro alvenis al Roterdamo. La spertoj pravas, ke la komuna libroeldonado estas irebla vojo, kiu reciproke servas la interesojn de ĈEL kaj de UEA. Ĝoje mi aŭdis la planojn pri la aranĝo

de internaciaj Esperanto-renkontiĝoj en Ĉinio, kiuj certe vekos grandan interesiĝon en la movado. Estas antaŭvidebla ankaŭ la okazigo de Universala Kongreso en tiu ĉi jardeko. Pleje impresis min en Ĉinio la entuziasmo de novaj esperantistoj. Dum la lastaj jaroj multaj homoj ellernis la lingvon kaj la komencantoj reprezentas larĝajn tavolojn de la ĉina socio. Tio donas al ni taskojn, por ke ili ne trompiĝu, ili havu eblecon utiligi la

lingvon kaj ili restu en la movado.

Nia programo estis perfekte organizita. Mi tion asertas ne nur pro tio, ke ni vizitis multajn famajn vidindaĵojn, sed ankaŭ pro tio, ke ni ĉiam estis kun esperantistoj. Mi plurfoje rimarkis la signojn de tia afaŭbleco, kiu superis ŝajne la bone konatan ĉinan ĝentilecon. Aparte valoraj estis la renkontiĝoj, liberaj interparoloj kun malnovaj kaj novaj uzantoj de la

Ĉ. Ĉen, reprezentanto de ĈEL, salutas la Komitaton de UEA, kiam ĈEL fariĝis ĝia aliĝinta landa asocio.



Internacia Lingvo. Mi ekkonis multajn interesajn homojn, kun kiuj mi nepre ŝatus teni la amikajn rilatojn ankaŭ en la estonteco. Estis kompreneble tre utilaj la interparoloj kun la "profesiaj" esperantistoj, kunlaborantoj de El Popola Ĉinio kaj de la Fendlingva Eldonejo. Mi havis la bonŝancon viziti la redakcion de Radio Pekino, ĝian Esperanto-fakon. Kun ĝojo mi renkontis la geparolistojn kies voĉojn mi jam bone konis.

Mi havis eblecon paroli kun la gvidantoj de ĈEL kaj kun pluraj elstaraj personecoj de la ĉina movado. Akceptis min la Honora Prezidanto de Pekina Esperanto-Asocio, s-ro Ĉu Tunan, kiu estas vicprezidanto de la Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun Fremdaj Landoj. Ŝajnis al mi, ke lia subteno estas grava gajno por la ĉina movado. Reveninte hejmen mi ĝoje trovis lian nomon en la hungara enciklopedio de famaj vivantaj personoj. Lia agado, kiel ekzemple en la kontraŭanalfabetisma laboro estas tre pozitive traktata en tiu enciklopedio.

Apenaŭ necesas emfazi, ke la 17-taga vojaĝo en Ĉinio estis neforgesebla travivaĵo por mi: la promenado sur la Granda Muro kaj sur la Tian'anmen-placo, la ekvido de la suĝoŭ-aj ĝardenoj, la hangĝoŭ-a Okcidenta Lago kaj la viglaj ŝanhajaj stratoj. Kiel "movadisto" mi ekhavis multajn valorajn spertojn, ja la gastigantoj ĉion faris en la vizititaj urboj, por ke mi povu kiel eble plej bone ekkoni la agadon de esperantistoj. Mi esperas, ke la komenciĝinta evoluo de la ĉina movado restos seninterrompa kaj ĝi grave kontribuos al la antaŭenigo de Esperanto ankaŭ mondscale.



Usonaj Geamikoj en Ĉinio

de ZHU MINGYI

Estis profunda nokto de la 4-a de majo. Laborantoj de la Ĉina Esperanto-Ligo kaj la Pekina Esperanto-Asocio venis al la Bejing-a Flughaveno por bonvenigi la Vizitgrupon de la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, estratan de ĝia prezidanto William R. Harmon. Pro malfruigo de ekflugo de aviadilo, ili jam atendadis ses horojn, tamen ĉiuj restis viglecplenaj.

Je la 1-a horo de la sekvanta tago, la aviadilo surteriĝis kaj 16 usonaj geamikoj ĝoje intervidiĝis kun la ĉinaj samideanoj. Ili manpremis kaj salutis unuj al aliaj.

En vespero de la sama tago, la Ĉina Esperanto-Ligo regalas la usonajn gastojn per bankedo. En la bankedo vicprezidanto de ĈEL Chen Yuan transdonis al la gastoj korajn salutojn de prezidanto Hujucz kaj vicprezidanto

Jelezo kaj esprimis varman bonvenigon al ili en la nomo de ĈEL. Ili tostis foje-refoje por la nova disvolviĝo de la amikeco inter la ĉinaj kaj usonaj esperantistoj en la lastaj jaroj.

Ekde la sekvanta tago, akompanate de esperantistoj de Bejing, ili vizitis la imponan Tiananmen-pordegon, la pitoreskan Someran Palacon, la serpentuman Grandan Muron kaj la majestajn maŭzoleojn de Mingdinastio.

Je la 9-a de majo, la usonaj geamikoj flugis al la suda urbo Guilin, kiun ili longe sopiris viziti. Tie troviĝas pitoreskaj montoj, lazuraj riveroj, groteskaj kavernoj kaj interesaj rokoj. Gvidate de lokaj esperantistoj, la gastoj rigardis Lijiang-riveron, Diecaimonton, Fubo-monton, Ludi-kavernon kaj aliajn vidindejojn.

Sigeloj kun ĉinigitaj nomoj faritaj de la Epigrafa Societo Xiling por parto de la usonaj geesperantistoj



Krome ili vizitis la antikvan kanalon Lingqu, konstruitan antaŭ pli ol 2,000 jaroj. La gastojn forte ravis la pentrindaj pejzaĝoj de tiu loko. Tuj post reveno al la hotelo, grupestro s-ro Harmon telefonis al sia edzino en Usono, ke ŝi nepre vizitu la lokon en la venonta jaro.

Je la 13-a de majo, la usonaj geamikoj atingis la urbon Hangzhou kaj estis bonvenigataj de Lü Moye, gvidanto de la Prepara Grupo de la Hangzhou-a Esperanto-Asocio, kaj aliaj esperantistoj. Ili tre ĝojis, informiĝinte pri tio, ke inter la bonvenigantoj estas komencantino Hu Menggu — nepino de prezidanto Hujucz. Iu usona gasto diris humure: “Nun prezidanto Hujucz jam havas sian daŭriganton en la Esperanta afero!” Tio vekis ĝojan ridon.

Tie ili interesplene veturis per ĉinstila ŝipo en la Okcidenta Lago kaj aprecis ĝian pejzaĝon. La spegula akvo kaj ĉarmaj montoj refreŝigis la okulojn de la gastoj.

Antaŭ forlaso de Hangzhou ili speciale vizitis la Hangzhou-an brokteksejon, kiu faris la silkajn portretojn de Zamenhof antaŭ unu jaro. La gastoj esprimis sian saluton kaj koran dankon al la fabriko.



Suzhou-aj geesperantistoj donacas silkan standardon al la usonaj geamikoj.

Shanghai, la plej granda urbo de Ĉinio, sin ĝemeligis kun San-Francisko. Kiam la usonaj geamikoj venis al la urbo, ilin bonvenigis Liu Huozi, gvidanto de la Prepara Grupo de la Shanghai-a Esperanto-Asocio, kaj aliaj esperantistoj. Tie ili vizitis la Botanikan Ĝardenon, Geknaban Domon, la popolan komunumon Malu kaj la Unuan Ĉiovendejon. Ili ĝojis kontaktiĝi kun ordinaraĵoj kaj koni la vivon de la ĉina popolo.

Por esprimi amikecon de la esperantistoj de Shanghai al la usonaj geamikoj, la Prepara Grupo de SEA donacis al la gas-



La usonaj gesamideanoj vizitas la tombon de Yue Fei en Hangzhou.





Ge Baoquan, prezidanto de la Pekina Esperanto-Asocio, donas salutvortojn en la kunsido de ĉinaj kaj usonaj geesperantistoj.

urbo estas honore nomata "Tera Paradizo" kaj "Orienta Venecio". Tie ili rigardis la famajn parkojn Liuyuan, Zhuozhengyuan kaj Huqiu. Ĉarmeco kaj saĝa dispozicio de la ĝardenoj de Suzhou mirigis kaj multe ĝuigis la gastojn. S-ro John M. Weeks diris kortuŝite: "La beleco de la urbo vere sentigas nin, ke ni vivas kvazaŭ en paradizo!"

En tiu urbo la gastoj vizitis la Brodartan Instituton, Jadaĵo-fabrikon kaj la Fabrikon de Palisandro-gravuraj Mebloj. Ili multe laŭdis la talenton de laboristoj.

Esperantistoj de la urbo okazigis vesperon por bonvenigi la usonajn geamikojn, kaj ili kune kun la gastoj prezentis artajn programerojn.

Nanjing, la ĉefurbo de Jiangsu-provinco, estis la lasta urbo vizitata de la usonaj gastoj. En tiu fama historia urbo ili vizitis la Nanjing-an Pontegon super Jangzi-rivero, Xuanwu-lagon kaj

toj pentraĵon «Mateno» speciale faritan de fama pentristo Shen Roujian, vicprezidanto de la Ĉina Ksilografa Asocio kaj estro de la Shanghai-a Belartista Asocio. Pro tiu memorinda donacaĵo s-ro Harmon esprimis sinceran dankon en la nomo de

la tuta vizitgrupo. Li promesis, ke ili nepre faros pli da klopodoj por antaŭenpuŝi aktivadon kaj kontakton inter la esperantistoj de Shanghai kaj San-Francisko.

Je la 16-a de majo la usona vizitgrupo venis al Suzhou. Tiu

Koloraj Infanlibroj

NEZHA KIRLAŜ LA MARON

(88-Es-173P)

Mita legendo rakontas: Loĝantojn tiranis drak-reĝoj, kiuj regis pluvon kaj akvon. Por savi la popolamasojn la mirinda knabeto Nezha batalis kontraŭ la drakoreĝoj kaj fine subigis ilin per magiaj armiloj.

Eldonita de "El Popola Ĉinio"

262 x 180 mm. 84 paĝoj, broŝurita

£1.10 US\$ 2.30





la maŭzoleon de la granda pioniro de la ĉina revolucio D-ro Sun Jatsen, akompanate de profesoro Ye Fengzhi, gvidanto de la Prepara Grupo de la Nanjing-a Esperanto-Asocio. Krome ili vizitis la Nanjing-an Universitaton.

Je la 22-a de majo la usonaj geamikoj reflugis al Beijing. En la sekvanta tago ili ĉeestis la kunsidon aranĝitan de la redakcio de El Popola Ĉinio. Ili ĝoje diris siajn impresojn pri la vizito, kaj samtempe prezentis valorajn opiniojn kaj proponojn pri la ĉinaj Esperantaj eldonaĵoj. Ili esprimis, ke post la reveno al Usono ili nepre klopodos por

firmigi la amikecon inter la esperantistoj de la du landoj.

Je la 24-a de majo la Ĉina Esperanto-Ligo kaj la Pekina Esperanto-Asocio kune okazigis tekunsidon por la vizitgrupo. Ĝin ĉeestis pli ol 120 esperantistoj de Beijing. En la kunveno samideanoj de ambaŭ landoj interparolis en granda plezuro pri la Esperanto-movado de ambaŭ landoj kaj venis al bona interkompreno.

Dum la restado de la vizitgrupo en Beijing Ĉ. Ĉen, ĝenerala sekretario de ĈEL, kaj s-ro Harmon, prezidanto de ELNA, faris sinceran interparoladon kaj interŝanĝis opiniojn

pri plifortigo de kunlaboro inter ambaŭ flankoj.

En vespero de la 24-a de majo, la vizitgrupo okazigis reciprokan bankedon. En amika etoso ĉinaj kaj usonaj esperantistoj faris entuziasmajn interparolojn, reciprokis varman adiaŭon kaj deziris, ke ĉiam pli kaj pli kresku kaj firmiĝu la amikeco inter la popoloj kaj esperantistoj de Ĉinio kaj Usono.

Tagmeze de la 25-a de majo la usonaj geamikoj adiaŭis ĉinajn esperantistojn kun bedaŭro. Ili kredas, ke la vizito certe antaŭenpuŝos la rilaton kaj kontakton inter la ĉinaj kaj usonaj esperantistoj.

KONSTRUI NOVAN PONTON

(88-Es-156S)

Kvar intimaj amikoj: sciureto, leporeto, ĉimpanzo kaj elefanto, venkinte intrigon kaj malhelpon de vulpaĉo, unuanime sukcesis konstrui novan ponton.

Eldonita de la Fremdlingva Eldonejo, Pekino
170 × 190mm. 40 paĝoj bindita
£0.35 US\$ 0.65

Mendu ĉe: Libroservo de UEA
Peranto de EPC
aŭ Esperanta Sekcio de
GUOJI SHUDIAN,
P. O. Kesto 313,
Beijing, Ĉinio



KION MI VIDIS



William Harmon en la Suzhou-a Brodarta Instituto

DUM longaj horoj en Nankino, dum la pasintaj tagoj, atendente kun mia amiko Li la sorton de nia kara grupano Mary Murray**, mi pensadis, mi multe pensadis: Kion mi diru al miaj geamikoj kaj al miaj gekolegoj en Usono pri Ĉinio, post mia reveno al Usono? Kiel mi plej koncize rakontu al ili miajn multajn spertojn, miajn multajn sentojn kaj miajn konkludojn pri miaj spertoj en Ĉinio?

Tio estas preskaŭ neeble tasko, ĉar oni ne povas prelegi al siaj amikoj, ĉu ne? Se oni haltigas vin en koridoro kaj demandas, kion vi vidas en Ĉinio, vi ne povas prelegi al ili. Oni devas trovi koncizan respondon. Do mi provis skizi nur la plej trafajn, gravajn ecojn, samkiel fotoaparato provas kapti econ de iu pejzaĝo, kiun ĝi fotas. Sed ĝi ne povas iel-ajn kapti la tuton de ĝi. Do mi provu kaj mi trovis tie ĉi kvar esencojn, kiuj ĉiuj komenciĝas per la litero "B" en Esperanto. Hazarde "B".

La unua "B": Bariloj: Ĉie ni vidas murojn, muregojn, mure-

tojn, duonkonstruitajn murojn, plenkonstruitajn murojn, tamen kun pordoj, kaj tiuj pordoj plejparte estis malfermitaj.

La dua "B": Brikoj: Ĉie ni vidas brikojn, amase, amasete, amasege en longa vico, en mallonga vico, sed ĉie ni vidas brikojn. Kaj tiuj brikoj havas signifon, ĉar per brikoj homoj konstruas ne per maŝinegoj, sed per sia persona forto, per sia laboro, kaj la brikoj mem povas esti konstruitaj de homoj sen maŝinegoj. Kaj tio, kion Ĉinio konstruas per brikoj estas forta, longdaŭra.

La tria "B": Bicikloj: Ĉie ni vidas biciklojn, multajn biciklojn en Pekino, ĉie. Sed bicikloj ankaŭ estas signifaj. Tie ĉi ni ne vidas tiom da aŭtomobiloj. En Usono, ni usonanoj estas tre alkitimigintaj vidi ĉie aŭtomobilojn, multegajn aŭtomobilojn. Ĉie estas ankaŭ polucio. Biciklo estas rimedo de transporto, kiu uzas nur homan energion. Ĝi ne foruzas benzinon. Ĝi ne foruzas la publikan forton. Ĝi ne venenas la aeron. Ĝi donas al la

biciklanto multe da ekzerco. La biciklo al mi estas genia solvo por homa transporto unuope.

Alia "B": Babiloj: Ĉie oni vidas en Ĉinio homojn interparolantajn gaje, ridete, serioze, eĉ iom kolere, tamen ili parolas grupe, duope, triope, multope. Mi vidis neniun signon de subpremeco. Male, ĉiuj, kun kiuj mi mem parolis, estis dignaj, memkonfidaj kaj kleraj homoj. Oni diras tro ofte en la okcidenta mondo pro miskompreno, ke sub komunismo, la popolo devas esti kvazaŭ sklavo. En Ĉinio, miaj spertoj donis la konvinkon ke la vero estas tute mala al tio. Ĉie mi vidis babilantojn gajajn, kolerajn, tamen ili parolas unu kun alia. Ofte ni trafis etajn problemojn en Ĉinio. Rezultis ia interkonsiliĝo, post la interkonsiliĝo la problemoj estis solvita, ne per ordono, ne per iu diktado, sed per konsento de ĉiuj, al mi tio estas la multe preferinda vojo.

Do jen miaj kvar "B-oj" aŭ "Bo-oj", se vi preferas, plej koncizaj konkludoj, kaj nia grupo vivis nun kaj vojaĝis en Ĉinio kiel esperantistoj, ne kiel usonanoj aŭ simplaj turistoj, kaj pro tio ni gajnis multe pli profundan vidon, mi opinias, en la ĉina karaktero. Ni povis senti la dediĉitecon, la nemempenseman devosenton de la ĉinaj esperantistoj, kun kiuj ni konatiĝis.

EN ĈINIO*

de WILLIAM HARMON


Mi memoru, ke Zamenhof kreis Esperanton por esti ilo de homa interkomprenado kaj ilo de paco. La mondo tre malrapide agnoskas tion, speciale en Usono. La mondo, la tuta homo-familio bezonas ian videblan pruvon, ke Esperanto vere estas potenca forto por paco. Ĝis nun, ni usonaj esperantistoj ne tiom multe sukcesis; sed vi, ĉinaj esperantistoj, kun via dediĉiteco, povos esti trafa modelo ne nur por ni sed por aliaj nacioj. Ni urĝas vin daŭrigi viajn laborojn por Esperanto tiucele, kaj ni dek ses vojaĝantaj usonaj geesperantistoj aplaŭdas vin, kaj ni aplaŭdas vian agadon ĝis nun.

Do ni revenos hejmen morgaŭ kun multaj memoroj, farintaj multajn novajn geamikojn ĉinajn. Al la Ĉina Esperanto-Ligo kaj ties helpaj organizoj ni elkore dankas, ĉar vi donis al ni, dek ses usonaj geesperantistoj, neniam forgesblajn semajnojn en via lando.

Dankon!


* Tio ĉi estas la teksto de la parolado farita de s-ro William Harmon, estro de la Vizitgrupo de Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, je la 24-a de majo ĉe la bankedo aranĝita de la vizitgrupo. La titolo estas aldonita de nia ĵurnalisto.

** S-ino M. Murray malsaniĝis kaj enhospitaliĝis en Nankino.




Chen Yuan (la unua de maldekstre), vicprezidanto de ĈEL, kaj William Harmon (la dua de maldekstre), prezidanto de ELNA, en la bankedo aranĝita de ĈEL

William Harmon sur la Nanjing-a Pontego super Changjiang-rivero



VIVU LA AMIKECO KUNLABORO



Victor Arnold vizitas la Maŭzoleon de Sun Jatsen en Nanjing.

ĈAR ĉiu el nia vojaĝgrupo droniĝas en la plej varmaj, la plej amikaj, la plej koraj emocioj, tiel por la ĉinaj geesperantistoj kiel por la ĉina popolo kaj ĝia vasta, granda, belegalando, ĉar ĉiu el nia grupo kore deziras larĝe kaj longe esprimi sian amikecon kaj dankon, mi kuraĝas, ne, mi devas kuraĝi diri al vi la plej malgrandan eron de

tio, kion ĉiu alia membro de nia grupo volas diri al vi.


Mi vidis la pli-ol-kvin-miljaran kontinuan historion de la ĉina popolo, de la ĉina civilizacio; ĝi estas glorplena, edifanta; neniu alia povas kompari sin kun ĝi. La kvincentjara historio de Ameriko estas nur malgranda frakcio de ĝi, en multe da sencoj. Aliaj civilizacioj devus lerni el la ĉina pri la arto, pri la monumentaĵo, pri la muziko, pri la danco, ankaŭ pri la suferado, pri la kuraĝo, pri la persistado, pri la vivo mem. Ili devus rekoni la lecionojn pri la daŭrigo de la homara vivo, kiujn la ĉina popolo lernis, por ke la tuta homaro plibonigu la kondiĉojn de sia vivo.

La usona nacio, dum la malgranda periodo de sia ekzisto, atingis sukcesojn en la tekniko, en la disvastigado de sia produktajo inter la membroj de sia

socio. Ni konsciencie volas plibonigi la plej grandan amplekson de kondiĉoj de la vivo de ĉiuj membroj de nia socio, kaj por tio ni povas lerni multe el ĉiu alia civilizacio, kaj de la pasinteco kaj de la nuna tempo.

La malpli ol centjara vivo de la humana Esperanto-movado estas nur malpli ol duono de la vivo de Usono, sed ĝia kontribuado al la homara vivo estis rimarkinda. Ne estas grave ke ĝi kunigas nin ĉiujn ĉi tie, ke ni ĝuas ne rimarkindan festmanĝon. Sed la tasko plibonigi la tuthomaran vivon estas la plej grava el ĉiuj aferoj, kaj la okazo de tia dunacia kunveno devus iĝi parto de la kreskanta kunlaboro por la humanaj celoj de ambaŭ nacioj ĉi tie ĉeestantaj kaj de ĉiuj nacioj tutmondaj. La Esperanto-movado kunigu la tutan homaron en interkomprenado kaj kunlaboroj.

Victor Arnold (meze) sur la Nanjing-a Pontego super Changjiang-rivero



Victor Arnold en la bankedo aranĝita de la vizitgrupo de ELNA





de VICTOR ARNOLD (Usono)

La kontribuo de la ĉina Esperanto-movado al la tutmonda Esperanto-movado kaj al la humanismo mem estas granda, longtempa, multvalora, alte ŝatinda. Ni usonanoj vere scias pri la grandaj oferoj de la ĉina Esperanto-movado, eĉ dum la tempo de nia apartado. Ni ege bedaŭras perditajn okazojn por esprimi nian dankemon kaj profundegan respekton al vi kaj al ĉiuj, kiuj ne povas ĉeesti hodiaŭ vespere.

Sed la nuboj el la pasinteco disiĝis je la suno de via varmeco, de via grandanimeco, de via amikeco. Nia grupo malgajiĝas forlasi vian ravan, amindan landon kaj popolon, sed ni ĉiuj ĉi tie povas malantaŭen rigardi en la pasintecon lernante, povas amikiĝi nin pli forte en la nuna tempo ĝojante, kaj povas kunmarŝi brak-en-brake en la estontecon esperante.

Vivu la amikeco kaj la kunlaboro inter la geesperantistoj de niaj landoj, inter ĉiuj landoj, inter la tuta homaro!

** Tio ĉi estas la teksto de parolado farita ĉe la bankedo aranĝita de la Vizitgrupo de ELNA je la 24-a de majo en Beijing. La titolo estas aldonita de la redakcio de EPC.*

REGO DE TEARBOJ

Sur la monto Nannuo de Xishuangbanna-regiono de Yunnan (Junnan)-provinco kreskas giganta tearbo kun la aĝo de pli ol 800 jaroj. Tiu arbo kun prosperaj frondoj altas 5.49 metrojn kaj havas trunkon kun diametro de 1.38 metroj. Por kolekti la foliojn estas necesa eskalo. Se tion faras unu persono, li bezonas 3-5 tagojn. Ĝuste pro tio oni nomas ĝin reĝo de tearboj.

En Xishuangbanna, sur la monto Bada sin trovas alia reĝo de tearboj kun la aĝo de pli ol 1,000 jaroj, kiu famas pro jara produktokvanto de ĉ. 5,000 kg. da teo. Tie la 100-200-jaraj tearboj ne estas raraj.

Dianhon-teo de Yunnan farita el ĝiaj larĝaj folioj estas gagatnigra kaj la infuzajo orflava. Se oni verŝas tefoliojn en tason, tuj aperas bela ora cirklo, kvazaŭ ĉielarko entasiĝinta. Des pli admirinda estas ĝia forta bonodoro longe konservata. Ĝia infuzajo estas vere agrabla kaj refreŝiga.

HOUKUI-TEO

La nomita teo estas unu el la dek famkonataj tespecoj, produktata de Anhui-provinco de Ĉinio. La teĝardenoj troviĝas en la montoj Fenghuangjian, Shixingshan kaj Jigongjian, pli ol 500 metrojn super la

mara nivelo. Tie majeste leviĝas la montpintoj kaj kuŝas profundaj valoj. Tie la temperaturo estas malalta, vetero humida kaj tero fekunda. Somere, en la vespero estas malvarmete kaj en la mateno leviĝas nubmaro kaj ĉion vualas densa nebulo. Ĉio ĉi tio kreis plej bonajn kondiĉojn por tearboj. Dank' al tiaj naturdotitaj kondiĉoj, zorgema kolektado kaj pretigado formiĝis aparta kvalito de la teo.

Ĉiu folio de la tearbo havas unu ĝermon kaj du folierojn, kiuj estas dikaj kaj rektaj, helverdaj kiel olivo. Ekinfuzitaj, ĝiaj folioj jen leviĝas jen malleviĝas. Post momento la teakvo fariĝas klara kaj verda, forte bonodoranta. Trinkante, oni sentas ĝin adstringa unue, kaj poste dolĉa kaj bongusta. Bonodoro daŭras eĉ post tri aŭ kvar fojoj da infuzado. En 1915 ĝi estis premiita per ora medalo kaj atestilo en la Universala Ekspozicio de Panamo.

REGO DE KAMELIOJ

En la Lijiang-a Naxi-nacieca Aŭtonoma Gubernio de Yunnan-provinco troviĝas reĝo de kamelioj, 500-jara kaj kun dek miloj da floroj.

Ĉe la komenco de printempo ĝi ekfloras. En la daŭro de 100 tagoj la kamelioj floras unuj post aliaj je tridek fojoj. Ĉiufoje floras pli ol 1,000 floroj. Tial ĝi ricevis la nomon "kamelio kun dekmiloj da floroj". Ĉiu floro kun diametro de ĉ. 16 centimetroj havas naŭ stamenojn kaj 18 petalojn. Plejparto el ili floras duope. Iuj estas palruĝaj kaj aliaj rozkoloraj. La arbo kun granda kapo estas 10 metrojn alta, kaj ĝia ĉefa trunko dika kaj malalta. Dank' al la zorgema aranĝado de ĝardenisto ili estas plektitaj en tri-tavolajn flormurojn kiuj en vento aspektas kiel bela nubmaro.



MAŪZOLEO DE SUN JATSEN


de WEN ZONG

MAŪZOLEO de Sun Jatsen situas ĉe la suda piedo de la monto Zhongshan de la urbo Nanjing (Nankino). Zhongshan alinomiĝas Zijinshan. Vidate de malproksime, ĝi similas al giganta drako kuŝanta ĉe la bordo de Changjiang (Jangzi)-rivero. La loko tre plaĉis al D-ro Sun Jatsen, la granda revolucia antaŭiranto de Ĉinio forpasinta en 1925. Laŭ lia deziro oni entombigis lin ĉi tie en 1929.

La maŭzoleo situas sur montoklivo alta je 150 m. super la marnivelo, kaj okupas ĉ. 80,000 kvadratajn metrojn. Sidante dorse al imponaj montoj, la maŭzoleo rigardas al la sudo, kie sterniĝas vasta ebenaĵo.

La vizitantoj elaŭtiĝas sur la placo antaŭ la maŭzoleo. Centre de la

Memora halo, la ĉefa konstruaĵo de la Maŭzoleo de Sun Jatsen



placo lunarka kreskas altaj pinoj, kaj ĉirkaŭe garnas ombroriĉaj plantanoj. Bronza stara statuo de D-ro Sun Jatsen staras sur alta soklo en la suda parto de la placo.

Suprenirinte norden laŭ ŝtonaj ŝtupoj, oni vidas altan ŝtonan arkadon, sur kies kapitejoj gravuriĝas nubaj desegnoj. La orumita vorto "FRATECO" skribita de Sun Jatsen brilas sur atiko de la arkado.

Malantaŭ la arkado etendiĝas larĝa maŭzolea avenuo 400 metrojn longa kun altaj cedroj ambaŭflanke. Ĉe la fino de la avenuo troviĝas la ĉefa pordo de la maŭzoleo, sur kies atiko estas gravurita skribaĵo de D-ro Sun Jatsen "LA LANDO APARTENAS AL LA POPOLO". Pordo grandaj ŝtonaj leonoj digne kaŭras ambaŭflanke ĉe la pordo. Post la pordo estas stelea kiosko kun grizaj muroj, bluaj tegoloj kaj duoblaj aleroj. La steleo 8 m. alta staras en la centro de la kiosko.

Malantaŭ la stelea kiosko 299 granitaj ŝtupoj kondukas supren ĝis montotalio, ambaŭflanke de la ŝtuparo kreskas pinoj, cipresoj, sikomoroj, kalunoj kaj pitosporumoj (*Pittosporum tobira*). Ĉe la ekstremo de la ŝtuparo estas vasta bazamento, kaj en ĝia centro sidas la ĉefa konstruaĵo de la maŭzoleo — memora halo.

La memora halo estas konstruaĵo imitanta strukturon de ĉina antikva palaco, kies muroj estas masonitaj el granitaj pecoj. La tegmento el bluaj glazuritaj tegoloj havas duoblajn alerojn, la internaj muroj estas masonitaj el nigraj marmorplatoj kaj sur la du flankaj muroj estas ĉizita la verko de D-ro Sun Jatsen "Programo de Landkonstruo". Centre de la halo estas neĝblanka mar-

mora sida statuo de S-ro Sun Jatsen, kiu rigardas antaŭen kaj tenas ambaŭmane malvolvitajn paperojn, kvazaŭ meditas pri la neplenumitaj aferoj.

Post la halo, trapasinte mallarĝan vojon, oni eniras volban konstruaĵon el blankaj ŝtonoj, ĝi estas la ĉerka ĉambro. Centre de ĝi estas ronda tombokavo ĉirkaŭata de glata ŝtona balustrado. En ĝi estas marmora dorsokuŝanta statuo de Sun Jatsen kaj sub la statuo eterne ripozas D-ro Sun Jatsen. Ĉiuj vizitantoj kun alta respekto rememoras lian grandan meriton de renversado de la imperia reĝimo kaj fondo de la respubliko.

Starante sur la bazamento antaŭ la halo, oni povas vidi maron da verda arbaro, kaj antaŭ la montoklivo la novajn etaĝdomojn kaj verdajn kampojn. La torenta Changjiang-rivero en malproksimo estas kvazaŭ blanka rubando tuŝanta la ĉielon. Vere plezuriga pejzaĝo!

La tuta konstruaĵo de la maŭzoleo similas al libera sonorilo, simbolanta la spiriton de D-ro Sun Jatsen vekita la popolamasojn kaj batali por demokratio kaj libero. La maŭzoleo estas projektita de la fama ĉina arkitekto Lü Yanzhi, kiu dediĉis sian tutan energion al la konstruo de la maŭzoleo kaj mortis en la aĝo de 35 jaroj.

Nun la maŭzoleo estas unu el la gravaj protektendaj historiaj restaĵoj de la tuta lando. Ĝiajn protektadon, riparadon kaj konstruadon zorgas la Administra Komitato de la Maŭzoleo de Sun Jatsen. La loka registaro fermis la monton por faciligi forstumadon kaj ŝanĝis la tutan lokon en vastan arbaran ĝardenon.


La grandioza Maŭzoleo de Sun Jatsen altiras al si multajn vizitantojn. (Bonvolu legi la artikolon "Maŭzoleo de Sun Jatsen" en ĉi-numero.)

Fotoj de REN SHIYIN

Panoramo de la Maŭzoleo de Sun Jatsen



Cinaj kaj fremdlandaj vizitantoj





Vojoj en la maŭzoleo

Memora Halo



La bronza statuo de d-ro Sun Jatsen



FOTOJ PRI NATU-
RAJ BELAĴOJ FA-
RITAJ DE E-ISTOJ

de TIBOR SEKELJ (Jugoslavio)

Ĉielarko



Lotusfloroj



FONDIĜIS HUANGSHI-A ESPERANTO-ASOCIO

Huangshi estas la dua granda urbo de Hubei-provinco. Ĝia Esperanto-Asocio fondiĝis je la 24-a de majo de la kuranta jaro. La inaŭguron ĉeestis respondeculoj de la Urba Partia Komitato, la Scienc-teknika Ligo de la urbo, la Hubei-a Esperanto-Asocio kaj la Wuhan-a Esperanto-Asocio. Gvidanto de la prepara grupo de la asocio faris raporton pri ĝia laboro. En la pasinta pli ol unu jaro la prepara grupo funkciigis Esperantajn kursojn, kompilis lernolibrojn, kulturis Esperantajn instruistojn kaj aktivulojn, malfermis montrofenestron por konigi Esperanton kaj kuraĝigis tiulokajn esperantistojn korespondi kun alilandaj samideanoj. La fondiĝo de la Esp-asocio de la nomita urbo pluapase akcelos progreson de Esperanto-movado. La kunveno elektis veteranan esperantiston Li Fu, vicsekretario de la Partia Komitato de la urbo, kiel honoran prezidanton de la asocio, kaj Hu Guozhu, Lin Liyuan kaj Zhang Xinsheng kiel gvidantojn.

“ESPERANTA KURSO” EN REVUO «SCIENCA KAJ TEKNIKA ĜERMO»

Ekde la 1-a de junio la nomita revuo fondita de la Guizhou-a Ligo de Sciencaj kaj Teknikaj Konsilantoj por Geknaboj malfermis la ru-

brikon “Esperanta Kurso”, kiu daŭros du jarojn. En tiu rubriko oni unue publikigis artikolojn “Pri Esperanto”, “Ĉiuj Lernu Esperanton”, “Prononcado de Esperantaj Literoj” k.a.

ESPERANTA EKSKURSO EN SHANXI

Je la 1-a de majo la prepara grupo de la Shanxi-a Esperanto-Asocio organizis esperantistojn por printempa ekskurso. La ekskursantoj konigis Esperanton en la parko Jinci, fama pitoreskejo de Taiyuan, per ekspozicio de Esperantaj eldonaĵoj ĉe la pordo de la parko. En bosko ili prezentis Esperantajn programerojn kaj disaŭdigis Esperantajn kantojn, per kiuj ili altiris al si multajn rigardantojn kaj nemalmultaj el ili tuj montris sian deziron lerni Esperanton.

AKTIVECOJ DE LA XI-AN-A ESPERANTO-ASOCIO

Jam finiĝis du Esperantaj kursoj funkciigitaj kune de la nomita asocio kaj la Komitato de la Komunisma Junulara Ligo de Beilin-distrikto de la urbo depost la fondiĝo de la asocio en la lasta aŭgusto. Nun iras en la urbo aliaj du Esperantaj kursoj en la redakcio de la Xi-an-a Vespera Ĵurnalo kaj en la Xi-an-a Fremdlingva Instituto. En majo de la kuranta jaro la asocio organizis en Dayanta-pitoreskejo renkontiĝon de esperantistoj, en kiu la kursanoj interŝanĝis sperton en la lernado kaj prezentis Esperantajn programerojn.



Esp-propagandistoj de la Shanxi-a Esperanto-Asocio en Jinci-parko

ESPERANTA KURSO POR GEJUNULOJ EN FUZHOU

Subtenate de la kultura departemento de Fujian-provinco, la Komitato de la Komunisma Junulara Ligo de Fuzhou funkciigis Esperantan kurson, kiu akceptis 131 gejunulojn post ekzameno. La kurso daŭros unu jaron kaj donas lecionojn dufoje ĉiusemajne. Verkisto Ma Ning, vicprezidanto de la Literatura kaj Arta Federacio de la provinco vizitis la kurson por kuraĝigi la kursanojn bone lerni Esperanton.

PRELEGO PRI ESPERANTO EN NINGBO

Je la 14-a de majo la prepara grupo de la Ningbo-a Esperanto-

Inaŭgura kunveno de la Huangshi-a Esperanto-Asocio



Ma Ning, veterana verkisto kaj vicprezidanto de la Literatura kaj Arta Federacio de Fujian-provinco, donas kuraĝigajn vortojn al gejunuloj por ilia Esp-lernado.



Asocio de Zhejiang-provinco okazigis kunvenon, en kiu Wu Benli, instruisto de la fremdlingva fakultato de la Normala Kolegio de Ningbo, faris prelegon. La prelegon aŭskultis pli ol 100 lernantoj de la postlabora lernejo de Yongjiang. Baldaŭ funkcios Esperanta kurso en iu lernejo.

VICPREZIDANTO DE UEA EN JAPANIO

Okaze de la aprila 17-taga vizitado al Japanio fare de s-ro Baldur Ragnarsson, vicprezidanto de UEA, kaj lia edzino s-ino Toŭrej Kolbeins, la Japana Esperanto-Instituto aranĝis prelegojn kaj diskut-kunvenon, al kiuj venis multaj esperantistoj kaj neesperantistoj.

Ges-roj Ragnarsson kaj ilia filo, kiu restadas en Japanio, kune vojaĝis al Kansajo kaj Nagoja por kontakto kun tieaj Esp. organizaĵoj.

STARIGO DE FONDUSO EN ELNA POR ESPERANTOMOVADO EN ĈINIO

Usona esperantista turisma grupo, kiu vizitis Ĉinion en majo ĉi-jare, decidis starigi fonduson en ELNA, kies celo estos kiel eble helpi al lokaj grupoj kaj kursoj en Ĉinio. La komenca decido de la grupo estis sendigi, pere de ELNA kaj ĈEL, kelkajn arojn da sonbendaj kasetoj kiuj povas esti uzataj por plibonigo de prononcmalicio kaj ankaŭ por

Membroj de Esperanto-klubo de San Diego, Kalifornio, legas nian revuon.



parolekzerco. Estis nomita speciala komitato en ELNA por prizorgi la uzon de la nova fonduso.

NI FONDU ASOCION DE INVALIDAJ ESPERANTISTOJ

La Unuiĝintaj Nacioj proklamis la jaron 1981: Jaro de handikapuloj. Ĉar inter esperantistoj ekzistas pluraj tiaj, s-ro D. Adnadj proponas fondon de Internacia Asocio de Invalidaj Esperantistoj, kiu havos la celon helpi unu al alia.

Pli detalajn informojn oni povas ricevi de : s-ro Dusan Adnadj, 56227-Borovo, Skolska ul. 25, Jugoslavio, aldonante respondkuponon por la respondo.

TUTLANDA KUNLOĜADO EN JAIZU. JAPANIO

“Tutlanda Kunloĝado de Esperanto, la 14-a”, tradicia intensiva Esp. lernejo, okazis en kutima loko, Junulara Domo de la gubernio Sizuoka en la urbo Jaizu de la vespero de la 2-a ĝis la tagmezo de la 5-a de majo 1981, kun 142 ĉeestintoj el la tuta Japanio kaj el FR Germanio, Britio, Francio, Islando, Hungario kaj Usono. La plejparto de ili troviĝis en aĝoj de malpli ol 30 jaroj.

3-A INTERNACIA MEDICINA ESPERANTO-KONFERENCIO (IMEK)

La Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA) kaj la Medicina Sekcio de Bulgara Esperantista Asocio organizos la 3-an IMEK de la 15-a ĝis la 19-a de julio 1981 en urbo Ruse, Bulgario.

Konferencaj temoj: 1. Prizorgado de la ĉirkaŭa medio; 2. La Internacia Lingvo Esperanto kaj la progreso de la medicino; 3. Diversaj liberaj prelegoj.

La konferencon partoprenos ĉ. 250 medicinistoj, farmaciistoj, veterinaroj kaj aliaj sanitaraj laboruloj el proks. 20 landoj.

PLANO PRI STARIGO DE KULTURA KAJ FERIA CENTRO DE NORDAMERIKAJ ESP-ISTOJ


Usonaj kaj kanadaj esperantistoj nun konsideras la eblecon pri starigo de kultura kaj feria centro de nordamerikaj esperantistoj. La plano antaŭvidas aĉeton de bieno en Florido kaj instalon de centro simila al tiuj jam ekzistantaj en Gresillon (Francio), Pisanica (Bulgario) kaj La Chaux-de-Fonds (Svislando). Se ĉio iros glate, la Esperanto-domo ekfunkcios jam en 1982.

PLUJAJ INFORMOJ PRI LA 54-A SAT-KONGRESO

De la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto 1981 kelkaj centoj de SAT-anoj el pluraj landoj kongresos en Bazelo, Svislando, kaj plian fojon kune spertos la valoron de Esperanto por interŝanĝi ideojn kaj rekte informiĝi pri la vera situacio en diversaj lokoj de la mondo.

Kiel kutime la programo jam anoncas multajn labor-kunsidojn, nome tiujn de SAT, LEA, Junulfrakcio, Pacista Frakcio, Liberecana Frakcio, liberpensuloj kaj ateistoj, Esp. Fakoj de Naturamikoj (TANEF), k.c.

Inter la interesaj prelegoj kaj studrondoj, kiujn prezentos Claude Gacond, direktoro de la Kultura Centro Esperantista en la Chaux-de-Fonds, estos tiuj kiuj temas pri: a) La Esperanto-pioniroj en Svislando kaj iliaj realaj aŭ spiritaj ligoj kun sennaciismo; b) Karakterizaĵoj de la socia kaj politika vivo en Svislando, interalie pri la laborpaco.





LA ĈINA AKADEMIO DE SCIENC COJ HAVAS NOVAN PREZIDANTON

La supera aŭtoritata institucio de la Ĉina Akademio de Sciencoj — la Konsilantaro de la Akademio okazigis sian kvaran sesion en majo. Je la 19-a de majo, ĉiuj ĉeestantaj membroj de la konsilantaro per sekreta balotado elektis prezidantaron de la akademio. En tiu antaŭtagmezo la unua kunveno de la prezidantaro elektis faman 66-jaran kemiiston Lu Jiaxi kiel prezidanton de la Ĉina Akademio de Sciencoj. Li estas la tria prezidanto de la akademio post Guo Moruo kaj Fang Yi. Laŭ la difino, lia tempo de prezidanteco daŭros du jarojn kaj li povos esti reelektita unufoje. La kunveno ankaŭ elektis 6 vicprezidantojn de la akademio.

ĈINAJ GEFILMAKTOROJ VIZITIS AŬSTRALION

Invitite de la Aŭstralia-Ĉina Konsilantaro, ĉinaj geaktoroj Zhang Yu kaj Da Shichang vizitis Aŭstralion en junio.

Dum la restado en tiu lando ili ĝoje intervidiĝis kun siaj aŭstraliaj kolegoj kaj partoprenis en la internacia festivalo de filmoj okazinta en Aŭstralio.

Zhang Yu kaj Da Shichang estas la plej bonaj geaktoroj, elektitaj maje en la kvara balotado de "Premio de Cent Floroj" sub la aŭspicioj de la redakcio de la gazeto "Populara Filmo" kun eldonkvanto de dek milionoj da ekzempleroj.

ORAN MEDALON RICEVIS LA VIOLONO "HONGMIAN"

La ĉina altklasa violono kun marko "Hongmian" ricevis oran medalon pro bona sonkvalito en la Kvara Internacia Violonfara Konkurso en Nov-jorko. Ĝi estas farita de Chen Jinnong de la Guangdong-a Fabriko de Muzikaj Instrumentoj. Ĝi estas karakterizita per delikata

farado, bela formo kaj agrabla sono.

EKSPOZICIO DE NACIECAJ POPULARAJ METIARTAJOJ

La nomita ekspozicio okazis en Beijing (Pekino) en majo kaj junio. En ĝi estis eksponataj papertranĉaĵoj, novjaraj pentraĵoj, popolaj amuziloj, kajtoj, ludiloj, skulptaĵoj, modlaĵoj, ombreloj, ventumiloj, ceramikajoj, vestornamaĵoj, tinkturitaj teksaĵoj, brodaĵoj, plektaĵoj kaj aliaj. La eksponaj haloj okupis 1,400 kvadratajn metrojn. Dum la eksponado oni akceptis mendojn de eksterlandaj komercistoj kaj turistoj.

LA DUA VOLUMO DE "ELEKTI TAJ VERKOJ DE N. CEAUSES CU" ELDONITA EN LA ĈINA LINGVO

La nomita volumo en la ĉina lingvo estas eldonita de la Popola Eldonejo kaj jam vendata en Ĉinio. Ĝi enhavas la ĉefajn verkojn de Ceausescu en la periodo de 1969-1973. La unua volumo en la ĉina lingvo eldoniĝis en 1979, kaj la tria nun estas en kompilado kaj tradukado.



SOMERA TAGO

*La tago somera brilete ridetas,
la tago junia, plej bela en mond'.
Radioj de l' suno abunde sin ĵetas
sur arbojn, sur lagon kun trembrila ond'.
La floroj en parko kaj sur la herbejo
kantadas silente al ĉiu anim'.
Silvio triladas el verda sidejo,
donacas al homoj ĝojigon sen lim'.*



Ilustraĵoj de
WEI ZAIYUN

SOMERVESPERO

*Krepusko sin mallevas en la somervesper',
arbaro malheliĝas en la fon',
la luma tag' finiĝas, moliĝas la aer',
ĉiele iras nun la lunvagon'.
Kukol' ankoraŭ kantas en la kvieta val'
kaj turdo trilas en la pinarbar',
en okcident' ruĝiĝas maldensa nubvual',
parolas pri reven' de l' suna ĉar'.*

M. MARKHEDEN (Svedio)

ĈINAJ HANDIKAPULOJ

La Unuiĝintaj Nacioj difinis 1981 kiel Internacian Jaron de Handikapuloj. Pro tio ni publikigas tri artikolojn kaj serion da bildoj, por ke niaj legantoj konu la laboron, studon kaj vivon de ĉinaj handikapuloj.

— La Red.

En Ĉinio troviĝas ĉ. 7,600,000 handikapuloj (inkluzive de blinduloj, surduloj, mutuloj, senmembruloj kaj homoj kriplaj pro laboro). Ili ĉiuj ricevis zorgadon kaj helpon de la socio kaj registaro en laboro, eduko, vivo kaj bonstatigo. Inter ili tiuj, kiuj havas kapablon labori, plejparte trovis okupon.


En urboj, la popola registaro laŭeble organizis handikapulojn al partoprenado en diversaj produktaj laboroj. En tiuj urboj, kiuj bone tion faris, preskaŭ ĉiuj handikapuloj ricevis laboron.

Por prizorgi blindulojn, surdulojn, mutulojn kaj aliajn handikapulojn, kiuj loĝas en la urbo kaj havas laboran kapablon, la

registaro starigis por ili bonstatigajn produktajn unuojn. Nun en Ĉinio estas 1,022 tiaj unuoj kun 135,000 laboristoj, inter kiuj troviĝas pli ol 48,000 handikapuloj. Tiuj unuoj produktas ĉefe elektronikajn akcesoraĵojn, kaŭĉukaĵojn, metalaĵojn, tekstilaĵojn, tapiŝojn, vestaĵojn kaj aliajn pli ol 1,000 specojn. En tiuj unuoj duonon de la personaro konsistigas normalaj homoj, kiuj havas la devon instrui al ili teknikon kaj zorgi pri ilia vivo. Tiuj unuoj estas liberaj de enspeza imposto pagenda al la ŝtato kaj la laboristoj ĉu handikapaj aŭ nehandikapaj ricevas regulan salajron ĉiumonate.


En ĉinaj mezgrandaj kaj malgrandaj urboj la handikapuloj plejparte estas postenigitaj en malgrandaj fabrikoj, produktaj grupoj, manĝejoj, butikoj kaj aliaj entreprenoj starigitaj de la strata loĝantara komitato. Ekzemple en la urbo Jinan (Ginan) de Shandong-provinco estas 1,400 tiaj entreprenoj kun pli ol 31,000 laboruloj, kaj inter ili troviĝas pli ol 6,000 handikapuloj. Iuj el tiuj entreprenoj starigis kooperan kuracejon, in-

Familio de blinda laboristo





Orkestro el blinduloj



Wang Xiaofan, surdmuta laboristo de la Beijing-a Kaŭĉukmetalaja Fabriko, renovigis maŝinon kaj pro tio estis elektita kiel urba aktivulo en tiu flanko.

fanĝardenon, manĝejon por laboristoj kaj oficistoj kaj aliajn kolektivajn bonstatigajn servojn. Laboristoj, kiuj havas ok laborjarojn, ricevas 60% de sia salajro, kiam ili estas malsanaj; tiuj, kiuj estas perdintaj sian laborkapablon pro maljuneco, ricevas emeritan pension ĉiumonate.

En la kamparo, ankaŭ popolaj komunumoj multe zorgas pri la blinduloj, surduloj, mutuloj. Ili okupis handikapulojn per agrikultura aŭ flankokupa produktado kaj laboroj en entreprenoj de komunumoj kaj brigadoj, ke ili havu tiom bonan vivon, kiom la lokaj normalaj komunumanoj.

La handikapuloj ĉu en urbo ĉu en kamparo ĝuas subvencion de la ŝtato kaj la kolektivo, se ili havas malfacilojn en la vivo. La maljunaj handikapuloj, kiuj estas perdintaj laborkapablon, ne povas zorgi pri si mem kaj ne havas gefilojn, pasigas siajn lastajn jarojn en domoj de maljunuloj. Tie ili ne bezonas zorgi pri manĝo, vesto, loĝado kaj kuracado.

Nun la tuta lando havas pli ol 700 tiajn domojn kun pli ol 60,000 homoj.

En Ĉinio, la handikapuloj same kiel normalaj homoj povas plene disvolvi siajn saĝon kaj kapablon. Nemalmultaj el ili fariĝis kadroj, inĝenieroj, pentristoj, specialistoj kaj profesoroj. Iuj el ili estis elektitaj kiel avangardaj laboristoj, aŭ laboraj modeloj, kaj aliaj kiel popolaj reprezentantoj aŭ komitatanoj de la Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco.

Por preventi kriplecon kaŭzitan de laborado, la registaro ellaboris serion da reguloj kaj teknikaj rimedoj pri sekura produktado kaj periode kontrolis la sekurigajn instalaĵojn kaj higienon en produktado, levis movadon de sekura produktado, kaj studis laborprotektan sciencan por pliefikigi laborsekurigajn rimedojn kaj instalaĵojn. Ĉio ĉi tio ludis rimarkindan rolon en sekura produktado. La laboristoj kaj oficistoj, kiuj kri-

pliĝis de laboro, ricevas monhelpon laŭ la laborsekuriga regularo kaj laŭ la seriozeco de kripleco kaj perdo de laborkapablo. Tiuj, kiuj emeritiĝis pro kripligo en laboro, ricevas favoran emeritan pension.

Resume, Ĉinio atingis certan sukceson en preventado de kripleco kaj kuracado, sanigo, edukado, laboro kaj aliaj bonstatigoj de handikapuloj. Tamen ĝi ankoraŭ ne povas plenumi ĉiujn postulojn pro tio, ke ĝi estas disvolviĝanta lando kun multaj loĝantoj, malriĉa bazo, relative postiginta ekonomio kaj malaltaj scienca kaj kultura niveloj. Ni kredas, ke Ĉinio povos antaŭenigi tiun laboron, dank' al aktivado de la Internacia Jaro de Handikapuloj kaj zorgado kaj klopodado de ĉiuj koncernaj organizoj.

** La aŭtoro funkcias kiel ĉefo de la Ŝtata Ĝenerala Labora Buroo kaj ĉefkomitatano de la Ĉina Organiza Komitato de la Internacia Jaro de Handikapuloj.*



Huang Nai

HUANG NAI*:

Vivo de Ĉinaj Blinduloj

EN Ĉinio estas nombritaj pli ol 1.6 milionoj da blinduloj. Kiel ili vivas? Kiajn servojn faras al ili la popola registaro? Pri tio mi volas raporti al miaj esperantistoj-amikoj.

En la malnova Ĉinio la popolo vivis mizeran vivon por ne paroli pri la vivo de blinduloj. Ili sin vivtenis nur per aŭgurado, kantado kaj almozetado. Dum la pasintaj 31 jaroj depost la fondiĝo de la nova Ĉinio la vivo de la blinduloj multe boniĝis, dank' al la penado de la popola registaro.

LABORON AL BLINDULOJ

En la komenca periodo de la nova Ĉinio, la registaro kolektis la vagantajn kaj aliajn malriĉajn blindulojn kaj liveris al ili loĝejon, manĝon kaj vestojn, por ke ili havu garantion en la vivo.

Post tio, la registaro speciale fondis fabrikojn por laborkapablaj blinduloj. Tiuj fabrikoj ricevis multajn favorojn de la popola registaro. Ekz., estas difinite, ke la fabriko ne pagas

enspezan imposton al la ŝtato se ne malpli ol 35% de ĝia tuta laboristaro konsistas el blinduloj, surd-mutuloj kaj aliaj kripluloj. Tiel ĝi povas ricevi pli multe da profito kaj asigni pli multe da mono por konstrui loĝdomojn, infanvartejojn kaj klubojn kaj disponigi aŭtojn por ilia veturo al laborejo.

La Jinguang-a Metalajo-fabriko en Tianjin estas fabriko de blinduloj, kiuj konsistigas trionon de la tuta personaro. Ĝi produktas pecojn de dizelo, kiuj estas vendataj en la internacia merkato. Helpate de normalaj homoj, la blinduloj bone posedas teknikojn de frezado, kaj povas kurbigi, trui k.a. Iuj elstaraj blinduloj estas elektitaj kiel laborejestroj kaj sekciestroj.

La registaro sendis la blindulojn kun fakaj scioj kaj teknikoj labori en institucioj, lernejoj, kulturaj kaj artaj organizaĵoj, hospitaloj aŭ masaĝ-kuracejoj. Kaj la blinduloj, kiuj dise loĝas, partoprenas en produktado aranĝita de la proksimaj loĝ-

kvartalaj komitatoj. Ili sin okupas per plektado, ŝnurumado, kartonskatol-farado kaj aliaj metioj. Iuj blinduloj, kiuj iras malfacile, povas labori hejme, kien la produkta grupo alportas krudmaterialojn.

La tradicia okupo de ĉinaj blinduloj estas artoprezentado kaj precipe muzikludado. Ekz., Daxing-gubernio de Beijing (Pekino) kaj la urbo Tangshan de Hebei-provinco havas artajn ensemblojn el blinduloj, kiuj ofte kantas, ludas muzikon kaj faras magion en fabrikoj kaj kamparo kaj estas bone akceptitaj. En la urbo Kaifeng de Henan-provinco kaj aliaj urboj estas funkciigataj artaj kaj kulturaj domoj de blinduloj. Iuj kulturaj domoj eĉ fondis artan kurson por blinduloj por altigi ilian artan nivelon. Tio ne nur riĉigas la kulturan vivon de la popolamasoj, sed ankaŭ havigas laboron al blinduloj.

Masaĝo estas alia okupo ŝatata de ĉinaj blinduloj. En la kvindekaj jaroj Beijing multfoje

funkciigis masaĝ-kursojn kaj elkulturis blindulojn-masaĝistojn por la tuta lando. Reveninte al siaj urboj, ili instalis masaĝ-hospitalon aŭ masaĝ-kuracejon sub la helpo de la registaro. Sole en Henan-provinco funkcias 44 tiaj hospitaloj kun pli ol 600 blinduloj-masaĝistoj. Dum la lastaj dek jaroj la blinduloj-masaĝistoj de la urbo Nanchang de Jiangxi-provinco faris kuracadon al 1.32 milionoj da personoj-fojoj, akceptis ĉ. 4,300 klientojn en hospitaloj kaj resanigis 85% de la kuracatoj. Krome, iuj provincoj kaj urboj instalas lernejojn por kulturi masaĝistojn.

Havante fiksjajn profesion kaj enspezon, la blinduloj vivas trankvilan vivon kaj plejparto de ili jam ĝuas familian feliĉon. Nemalmultaj blinduloj atingis rimarkindajn sukcesojn, dank' al sia penado. Iuj el ili fariĝis profesoroj, kuracistoj, artistoj, kantistoj, ŝtataj oficistoj, popolaj reprezentantoj kaj avangardaj laborantoj. Ekz., blindulo Gan Bolin perdis sian vidon en la infaneco kaj almozpetis. Post la Liberiĝo li estis sendita al lernejo por blindaj infanoj kaj muzika kurso por blinduloj. Nun li jam estas fama ludisto de la nacia muzikilo "er-hu", kaj laboras kiel vicprofesoro de la nacimuzikila sekcio de la Arta Instituto de Jilin-provinco. Li havas edzinon kun bona vidkapablo, kiu laboras kiel aktorino, tial li ĝuas feliĉan vivon de familio.

Krome, estas eminentaj blinduloj kiaj profesoro Tang Qinyi de la Trafika Universitato en Shanghai, piana docento Wang Shupej de la Shanghai-a Konservatorio, rakontisto Han Qixiang, muzikludisto Yin Mingshan, kantistino Zhou Qiwen kaj aliaj.

EDUKO AL BLINDULOJ

La ĉina registaro metas grandan atenton sur edukadon al la blinduloj. En la komenca periodo de la nova Ĉinio la Centra Popola Registaro faris instrukcion al siaj subaj registaroj, ke ili fondu lernejojn por surd-mutuloj kaj blinduloj, eduku la kriplajn infanojn, junulojn kaj plenaĝulojn kaj kulturu ilin en konstruantojn kun certagrada klereco, sciencaj scioj kaj tekniko.

La nombro de la lernejoj por blinduloj kaj surd-mutuloj kreskis de 41 kun 3,000 lernantoj en la jaro 1949 ĝis 292 kun 32,000 lernantoj en la jaro 1980, inkluzive de 65 lernejoj por blindaj kaj surd-mutaj geknaboj kaj 10 sole por blindaj geknaboj. Krome, multaj lokoj de nia lando fondis por blinduloj duonlaborlernejojn, lernejojn por elbaki oficistojn kaj laboristojn, masaĝ-kursojn, teknikajn vesperlernejojn kaj grupojn de blindaj infanoj en ordinara lernejoj.

Shanghai (Ŝanhajo) estas unu el la urboj de nia lando, kiu bone faris edukadon al blinduloj kaj surd-mutuloj. En la urbo funkcias 8 lernejoj de surd-mutuloj, 1 lernejo de blinduloj kaj 1 teknika lernejo de junaj surd-mutuloj. Fininte la studon en la elementa lernejo, la blindaj kaj surd-mutaj geknaboj de la urbo povas daŭre lerni en mezlernejo.

Por altigi la kleran nivelon de blinduloj oni ellaboris la komunuzan alfabeton ĉin-lingvan. Ĝi ludas aktivan rolon en ilia lernado kaj penso-interŝanĝado. Estis fonditaj por blinduloj brajlaj eldonejoj kaj gazetoj "Monata Revuo de Blinduloj", "Scioj kaj Vivo", "Sciencaj Scioj", "Higie-

naj Scioj", "Elektitaj Literaturaĵoj", "Scienco por Geknaboj" kaj aliaj.

KONTRAŬ BLINDECO

Preventado kaj kuracado de blindeco estas grava konsistiga parto de la bonstatiga afero de ĉinaj blinduloj. Por tio estis instalita speciala organizaĵo, pro kio la kontaĝaj malsanoj kiaj morbilo, difterio, B-encefalito kaj trakomo, kiuj facile kaŭzas blindecon al homo, estas bridataj. Dank' al la paŝpostpaŝa pliboniĝo de higienaj kondiĉoj multe reduktiĝis la proporcio de blindaj malsanoj en Ĉinio.

La enketado farita en la komenca periodo de la Liberiĝo montris, ke la ĉefa kaŭzo de blindeco estas komplikajoj de trakomo el la korneaj malsanoj. Tiam unu el ĉiu kvaroj da blinduloj perdis sian vidon pro trakomo. Por redukti la nombron de suferantoj de tia malsano la ŝtato aplikis efikan preventan metodon. Ekz., en Heilongjiang-provinco pli ol 70% de la loĝantoj suferis de trakomo en la komenca periodo de la Liberiĝo kaj nun nur 34.28%; kaj en la sama tempo la nombro de la blinduloj malkreskis de 0.6-0.8% al 0.11% de la tiea loĝantaro.

Por preventi kaj kuraci blindecon ĉinaj higienaj institucioj aplikas jenajn rimedojn: unue, instalas specialajn instituciojn por tiu celo; due, plifortigi studadon de eŭgeniko, fari ekzamenadon ĉirkaŭ la akuŝa tempo kaj instalas konsultan kuracejon de genetikaj malsanoj por preventi naskon de blinda ido; trie, kuraci kaj trejni blindajn malsanulojn por redukti blindigajn kaŭzojn ĝis minimumo; kvare, plifortigi scienc-esploran laboron pri blin-

INTERNACIA INVITA TURNIRO DE VIRINA KORBOPILKADO DE JINAN

En la lasta tagdeko de majo 1981, okazis la nomita turniro en Jinan de Ĉinio. Ĝin partoprenis 8 teamoj el 6 landoj de Eŭropo, Ameriko, Oceanio kaj Azio. Post 28 matĉoj de 7 rondoj Ĉinio gajnis la ĉampionecon, Rumanio — la subĉampionecon, Kanado — la trian lokon, Jugoslavio — la kvaran lokon, Aŭstralio — la kvinan lokon, la Unua de Aŭgusto, alia teamo de Ĉinio — la sesan lokon kaj Japanio — la sepan lokon.

Tiu turniro sin karakterizis per egaleco de fortoj kaj intensa konkurado inter la teamoj. En iuj matĉoj, eĉ en la lasta minuto ankoraŭ ne evidentiĝis la fina venko. La lerteco kaj varia taktiko de ĉiu teamo montris, ke la nunaj korbopilkitinoj ludas kuraĝe kaj obstine same kiel korbopilkitoj, ĉu en kapto de korbobotabula pilko aŭ pasigata pilko.

deco; kaj kvine, profesie trejni blindulojn.

MANKOJ EN LABORO

Kvankam Ĉinio atingis grandajn sukcesojn en tiu sfero, tamen ĝi devas fari multon por atingi la avangardan nivelon de la mondo.

Estas postiginta nia edukado al blindaj infanoj. Nun en Ĉinio troviĝas ankoraŭ multaj blindaj infanoj, kiuj ne vizitas lernejon,

ZHENG DAZHEN, LA UNUA ATLETIKA STELO DE AZIO

La usona gazeto «Virina Atletika Mondo» elektis ĉinan elstaran altosaltistinon Zheng Dazhen la unua atletika stelo de Azio.

En la usona atletika konkurso «Libera Sonorilo» je la 17-a de julio, 1980 en Filadelfio, ŝi kreis la rekordon de la virina altosalto de Azio per 1.92 metroj.

Tiu gazeto publikigis la nomojn de la mondaj kaj kontinentaj atletikaj steloj, elektitaj de 35 ĵurnalistoj el 21 landoj.

Inter la kandidatoj-atletinoj de Azio troviĝis 7 ĉinaj sportistinoj: Diskojetistino Li Xiaohui (la tria loko laŭ la gajnitaj balotoj), lancojetistino Li Xia (la kvara loko), pezglobjetistinoj Shen Lijuan kaj Lu Cheng (la kvina kaj sesa lokoj), 100-metra barierkuristino Dai Jianhua kaj sportistino de Taiwan Lai Lijiao (ambaŭ la okaj lokoj) kaj mezlongdistanc-kuristino Zhang Xiunen (la naŭa loko).

CINAJ SPORTISTINOJ EN INTERNACIA INVITA TENISA TURNIRO

En la unua tagdeko de majo ĉijare, okazis la nomita turniro en Bukareŝto. Ĉinaj tenisistinoj Chen Juan kaj Duan Lilan gajnis la ĉam-

por ne paroli pri edukado al la antaŭlernaĝaj blindaj infanoj. Plejparto de la ĉinaj blindaj infanoj ĝuas nur edukon de la elementa lernejo, kaj instruaj instalaĵoj estas ne nur malmoldernaj sed ankaŭ ege malmultaj. En Ĉinio nun troviĝas nenia instituto por kulturi tiu-fakajn instruistojn.

Krome, en iuj lokoj de nia lando restas senlaboreco por blinduloj, ĉar iuj homoj abomenas ilin. Nombro da blinduloj

pionecon kaj subĉampionecon de la virina solludo. Ĉina tenisistino Yu Liqiao — la trian lokon de tiu ludo kun la alia.

La turniro konsistis nur el la solludoj kaj paroladoj de viroj kaj virinoj.

Rumanaj gesportistoj gajnis la ĉampionecon kaj subĉampionecon de la vira solludo kaj la virina parlado, kaj la ĉampionecon de la vira parlado.

En la turniro partoprenis gesportistoj de Bulgario, Ĉinio, Pollando kaj Rumanio.

SPORTO LONGIGAS LA VIVON

Lastatempe okazis la prepara kunveno de la Ĉina Korpokultura Asocio de Maljunuloj. Ĝi deklaris, ke Ĉinio jam fariĝis unu el la landoj de longvivuloj en la mondo. La nombro de maljunuloj kun la aĝo super 65 jaroj atingis 45 milionojn.

La materialoj liveritaj de la kunveno montris, ke en la lastaj jaroj pli kaj pli multiĝis maljunuloj, kiuj faras sportajn aktivadojn. En Beijing, Shanghai, Xi-an, Changchun kaj aliaj urboj maljunuloj fondis siajn lokajn asociojn de korpokulturo, tenisajn teamojn, longdistanc-kurajn grupojn kaj aliajn organizaĵojn de sportoj.

havas malfacilojn en la vivo. Kvankam oni ellaboris planon pri preventado kontraŭ blindeco, tamen la laboro en malsamaj lokoj disvolviĝas neegale. Sed ni kredas, ke kun disvolviĝo de la nacia ekonomio la afero de la ĉinaj blinduloj certe antaŭen marŝos rapide.

* La aŭtoro estas fama esperantisto, vicprezidanto de la Ĉina Asocio de Blinduloj kaj Surd-mutuloj, kaj estis membro de la Konsilantaro de la Jan'an-a Esperantista Ligo en la 40-aj jaroj.

Amputita junulo kaj lia amatino

EN aprilo de 1979 kripla junulo Jiang Weihua revenis hejmen el geologia taĉmento kune kun sia novedzino, kaj tio faris sensacion en Xiaogangzhen de Yancheng-gubernio, Jiangu (Giangsu)-provinco. Samvilaĝanoj venis por vidi ilin. Laŭdis gemaljunuloj, sed gejunuloj dubis, ĉu longe daŭros la amo de la novgeedzoj.

Jiang Weihua estis vicestro de bora skipo de prospektora taĉmento sub la Geologia Ministerio. Novembre de 1976, kiam starigata ŝaktoskafaldo tuŝis altensian lineon, lin frapis 10,000-volta kurento. Senprokrasta kuracado savis lin el danĝero, sed li estis amputita je la kvar membroj. Ĝuste en tiu tempo, kiam la granda malfeliĉo lin trafis, li akiris plej valoran objekton — la koron de sia amatino Ren Zongli.

“Weihua, Weihua. . .” milde kaj mallaŭte vokis lin Ren Zongli ĉe lia lito. Sed li kun larmoj kaŝis sin sub la litkovrilo, ŝajnigante sin dormanta. Jam estis la kvina tago post kiam li reakiris la konscion. Li pensadis aflikte kaj decidis rompi kun ŝi, ĉar li ne volis malfeliĉigi ŝin per sia kripleco.

“Weihua, Weihua. . .” vokis la knabino ree. Ŝia voĉo estis ankoraŭ tiel milda kaj tiel intima. Sed kiam ili unufoje renkontiĝis, ŝia voĉtono estis tiel spitema.

“Kiu el vi estas lerta en ludo de tabloteniso?” demandis far-

meja anasbredistino kun paro da malgrandaj nigraj harligoj. Ŝi portis purajn debluiĝintajn laborkostumojn. Kun defia mieno kaj nenia hontemo ŝi staris vizaĝe al knabegoj, ĵus finintaj korbopilkadon.

La junuloj stuporiĝis, puŝetis unu alian kaj fine elpuŝis la plej bonan ludanton Jiang Weihua. La rigardo de la knabino falis sur lin kaj ŝi diris: “Ni rivaludo morgaŭ!” “Bone, morgaŭ,” senhezite konsentis Jiang Weihua.

Tiel ili interkonatiĝis. Post pluraj renkontiĝoj la knabino enamiĝis iom post iom al tiu forta kaj linda junulo. Ŝi estis dolĉe kontenta en la koro kaj fieris pro sia amato. Kaj Jiang Weihua ekhavis bonan impreson pri ŝi jam je la unua intervidiĝo. Li trovis ŝin bonkora, tenera kaj firmavola. Tia junulino kun tiuj karakteroj estis ĝuste de li longe dezirata. Ĉiufoje, kiam li kunestis kun ŝi, li sentis varman fluan de feliĉo trakuranta lian koron.


Ju amo pli profunda, des ĝia perdo pli pika. Weihua devis kaŝi la koran doloron kaj plorsingultis sub la litkovrilo. Subite li elŝovis sian kapon el la litkovrilo kaj kun larmoj petis la knabinon: “Forgesu min, por ĉiam!”

“Ne!” obstine respondis la knabino, “mi volontas flegi vin la tutan vivon!”

“Vi malfermu la kovrilon kaj rigardu!” diris la junulo malespere.

La knabino etendis sian tremantan manon. . . Restis al li nur dekelkcentimetraj stumpoj de la brakoj kaj la maldekstra femuro, kaj lia dekstra kruro estis amputita ĝis sub la genuo. Tiu, kiu kuŝas antaŭ ŝi, similas al statuo ne kompletigita. “Ĉu tiu estas mia amato?” Ĉe ŝaktoskafaldo li laboris energie; sur sportejo li manovris pilkon lerte. Li laboris en multaj lokoj tra la lando kaj ĉie restis liaj piedsignoj. Kiom da ridoj kaj korverŝaj

Ren Zongli mallaŭte vokas Weihua. . .





Komenciĝis ilia nova vivo.
 Ilustritaj de WEI ZAIYUN

vortoj li faris en vesperaj horoj, kiam ili promenadis sur pado! Ĉio tio forpasis kaj neniam ripe-tiĝos. Ŝi svenis, antaŭ ŝi estis plena mallumo.

Lia neklara plorsingulto vekis ŝin. “Kion fari?” ŝi pensis. “Li vundiĝis pro laboro, lin multe

turmentas la perdo de la kvar membroj. Mi ja ne devas forlasi lin kaj aldoni al li pli da doloro.” “Homo devas havi koron,” ofte instruis ŝin ŝia avo. Tion pensinte, ŝi diris al li senhezite: “Estu trankvila! Mi ne lasos vin senhelpa.” Kiom da konsolo, kuraĝigo kaj forto donis al li ŝia voĉo plena de amo!

Informiĝinte pri tio, la patrino de Zongli diris kolere: “Vi ne bedaŭros, ke vi edziniĝos al senmembrulo!” Tiam la patrino neniel povis kompreni la decidon de la filino. Tiu ĉi faris simplan respondon: “Ne maltrankviliĝu pri tio, mi neniam forlasos lin!”

Ŝi kaj Weihua geedziĝis la 17-an de majo 1978. Tre modesta ĉambro estis ornamita per kelkaj faskoj da freŝaj floroj. Gratulantoj alvenis unuj post aliaj.

La juna paro komencis sian novan vivon. Ĉiumatene muziko de radioricevilo vekis Weihua el la dormo, tiel komenciĝis lia unutaga vivo. La edzino helpis lin sidiĝi, vestis lin, lavis al li la vizaĝon kaj manĝigis lin. Antaŭ ol prepari pladojn, ŝi ĉiam petis lian opinion kaj laŭeble plenumis lian deziron. Li preferis fiŝpladon jam de sia infanaĝo. En la komenco ŝi ne tre

bone kuiris fiŝojn. Tiam ŝi sidiĝis lin apud la forno por peti liajn konsilojn. Preparinte la pladon, ŝi tranĉis fiŝojn en pece-tojn, senostigis ilin kaj metis ilin en lian buŝon.

Por fari lian vivon interesa, ŝi ofte veturigis lin eksteren per triciklo. Kiam oni prezentis bonan filmon aŭ teatraĵon, ŝi ĉiam veturigis lin al la kinejo aŭ teatro por amuziĝo. Weihua interesiĝis pri kurantaj aferoj, li ĉiutage informiĝis pri novaĵoj per radioricevilo kaj krome abonis ĵurnalon. Trovinte ke legado estas por li malfacila, Zongli konstante voĉlegis por li ĵurnalon kaj novelojn. Weihua, antaŭa pilko-maniulo, fariĝis hodiaŭ ŝakomaniulo. Ĉiufoje, kiam li ludis kun alia, sub lia komando la edzino movis anstataŭ li ŝakpecojn.

Baldaŭ ilia familio plena je amo kaj varmo havis viglan, amindan bebon. La patrino de Zongli sendis al sia nepo vestojn de malproksime. Kortuŝita de ilia fidela amo, ŝi fine komprenis sian filinon.

Forpasis tri jaroj. Ilia amo restas kiel antaŭe. La dubemaj okuloj en la ĉirkaŭaĵo fariĝis respektoplenaj! La vilaĝanoj diris: “Vere neordinara ŝi estas!”

(Daŭrigo de p. 44)

duaj la popolan vivon, ekz. paŝtadon, surĉevalan arkopafadon, remadon k.a., la triaj festajn rajdkonkurson kaj lukton, kaj la kvaraj religiajn ceremoniojn de lamaoj en templo. En ili oni povas vidi delikatan priskribon de la tibetaj pentristoj pri la reala vivo.

La freskoj “Princino Wencheng al Tibeto” en la Potala Palaco kaj la templo Zulakang, “Princino Jin-cheng al Tibeto” en la Potala Palaco,

“Chisongdezan Trovas Sian Onklon ĉe la Bankedo” en Lorbu-ĝardeno, “Intervidiĝo de Basba (ĉefo de la sekto Sajia de lamaismo en la 13-a jc.) kun Kublajo, la imperiestro de Yuan-dinastio, ĉe Liupan-montaro” en la templo Zhashilhumpo kaj “Finkonstruo de la Templo Canyon” en la templo Canyon, ĉiuj vivece reaperigis gravajn historiajn eventojn kaj elstarajn historiajn personojn, prikantis la unuiĝon de la patrolando kaj solidarecon de diversaj naciecoj.

La farboj uzataj por tibetaj freskoj estas ofte rafinitaj de pentristoj el mineraloj. La farboj havas pezajn kolorojn kaj povas plurfoje kovri alian koloron. Kaj krome, la penikoj estis faritaj de pentristoj. La freskaj linioj estas fortaj. La freskoj estis farbitaj pompe. La ora koloro estis vaste uzata. Senvaria kolortuĉado, nuanca kolorigado, diversaj stiloj kaj formoj estis uzataj en pentrado. Ĉiuj budhaj figuroj estis pentritaj aŭ skulptitaj laŭ rigoraj mezuroj.

LA SEPDEKA PRINTEMPO

ESTIS la 26-a de aprilo. Flo-roj de cercisoj (Cercis chinensis) kaj siringoj en Qinghua-universitato sin banis en printempa sunlumo. Pli ol 15,000 instruistoj, studentoj, oficistoj kaj laboristoj de la universitato kaj ĝiaj pli ol 8,000 pasintaj diplomitoj kune celebris la sepdekan datrevenon de la fondiĝo de la universitato.

PLEJ ALTA LERNEJO

La ĝardeno de Qinghua kun lagetoj kaj verdaj arboj en kvieta medio estas bona loko por lernado. Sur la fronta pordo de ĝia malnova H-forma domo pendas la titola tabulo kun la vortoj "Ĝardeno de Qinghua" skribita de la imperiestro Xianfeng (1851-1862 en regado) de Qing-dinastio. Ĝiaj zigzagaj koridoroj kaj domoj estas

jam riparitaj. Post la H-forma domo troviĝas lotusflora lageto agrabla.


Qinghua-universitato antaŭe nomiĝis Qinghua-lernejo, kiu fondiĝis en 1911 kaj servis kiel prepara lernejo de ĉinaj studentoj lernontaj en Usono. En 1928 ĝi ekuzis la nunan nomon kaj tiam havis kolegiojn literaturan, sciencan, inĝenieran, juran kaj agrikulturan. En ĝi studis aŭ laboris multaj ĉinaj famkonataj sciencistoj kaj eruditoj.

Mi intervjuis rektoron Liu Da de Qinghua-universitato. Li diris al mi, ke post la fondiĝo de la nova Ĉinio, al Qinghua-universitato okazis radikala ŝanĝiĝo. Post la reguligo de kolegioj kaj fakultatoj de altaj lernejoj en 1952, ĝi disvolviĝis iom post iom en sintezan sciencan kaj inĝenieran universitaton konforme al la

bezono de la patrolanda konstruado. Ĝi nun havas 16 fakultatojn pri arkitekturo, civila kaj media inĝenierado, akvoutiliga inĝenierado, mekanika inĝenierado, precizaj instrumentoj, termoenergia inĝenierado, elektra inĝenierado, aŭtomato, inĝeniera fiziko, kemio kaj kemia inĝenierado, inĝeniera mekaniko, aplika matematiko, ekonomia administrado kaj aliaj kun 43 fakoj kaj unu esplora sekcio de fundamenta instruado. Krome, ĝi havas esplorajn institutojn de nukleenergia tekniko, mikroelektroniko, materiala scienco kaj aliaj, 87 laboratoriojn kaj 9 eksperimentajn fabrikojn servantajn al la instruado kaj scienca esplorado. Ĝia biblioteko konservas 1,900,000 librojn kaj 3,000 specojn da gazetoj en la ĉina kaj alilandaj lingvoj kaj starigis rilatojn kun pli ol 200 universitatoj kaj esploraj institutoj de pli ol 100 landoj por interŝanĝi sciencajn kaj teknikajn materialojn.

Qinghua-universitato estas unu el la plej altaj lernejoj de nia lando kaj havas multajn bonajn instruistojn. En la pasintaj 31 jaroj post la fondiĝo de la nova Ĉinio, ĝi kulturis por la ŝtato pli ol 40,000 fakulojn, t.e. la dekoblo de la totala nombro de ĝiaj diplomitoj en la 38 jaroj antaŭ la Liberiĝo. Ili plejparte fariĝis ĉefaj fortoj sur la industria, eduka, scienca kaj teknika frontoj de nia lando. Krome, en ĝi studas studentoj venintaj el 22 landoj.

Geinstruistoj de la elektra fakultato studas pri la stabileco de la longdistanca elektro-konduka sistemo.



BONA STILO EN STUDADO

La serioza kaj praktika stilo de Qinghua-universitato en studado formita en dekoj da jaroj nun ricevis pluan disvolviĝon.

La plejparto de ĝiaj studentoj estas ĉ. 20-jaraj gejunuloj, ili alte taksas sian ŝancon de studo. Oni diris al mi, ke ĉiutage je la tagiĝo studentoj voĉlegas fremdlandajn lingvojn sub vojlampo. Vespere, ĉu la klasĉambroj ĉu la legoĉambroj de la biblioteko estas plenaj de studentoj absorbite legantaj.

Mi intervjuis ĉefinstruiston Cao Zhenyu de la radio-fakultato. Li diris, ke lia klaso havas 36 studentojn, inter ili la plej aĝa estas 31-jara kaj la plej junaj 18-jaraj. Ili ĉiuj studas diligente. En la klaso estas studento Chen Datong, kiu fariĝis laboristo post sia diplomitiĝo el mezlernejo en 1974. Li eniris en la universitaton per altaj poentoj en la ekzameno en 1977. Krom studo en la klasĉambro li legis ankaŭ multajn referencajn librojn ĉinajn kaj alilandajn, liaj poentoj pri ĉiuj studobjektoj superis 95. La universitato faris al li ekzamenon kaj poste konsentis, ke li studos kune kun esploraj studentoj.

La laborema spirito kaj fideleco de la instruistoj al la eduka afero profunde impresis min.

Iun matenon mi intervjuis 73-jaran profesoron Zhao Fangxiong, veteranan matematikiston, en lia apartamento. Li diplomitiĝis el Qinghua-universitato en 1928. Ekde 1933 li donis lecionojn en la universitato pri supera geometrio kaj supera mikroskopa kalkulo. Nun li estas vicrektoro de la universitato kaj dekano de la fakultato

de aplika matematiko. En la pasintaj preskaŭ 50 jaroj li elkulturis studentojn nombron post nombro. Li elkore ĝojas pro rapida progreso de la gejunuloj. Li ĉiam serioze preparis lecionojn. Liaj studentoj admiris, ke la lekiado de prof. Zhao estis pacienca kaj facile komprenebla kaj ofte faris al ili profundan impreson.

En la frua periodo Qinghua-universitato havis multajn profesorojn, sed malmultajn asistantojn, tial multaj profesoroj devis atenteme korekti la hejmtaskojn de studentoj. Nun la instruaj kondiĉoj estas multe bonigitaj, sed ili laboras same diligente kiel antaŭe. Iuj el ili tiel absorbiĝis en scienca esplorado, ke ili eĉ forgesis manĝon kaj dormon. 79-jara profesoro Shi Jiayang diris: "Mi jam maljuniĝis, kaj mi tre deziras postlasi miajn lernitaĵojn al la juna generacio." Li estas estro de instrua esplora grupo kaj verkas nun "Sinteza Utiligo de Akvoenergio". Ĉiutage li laboras ok horojn. La universitato sendis al li asistanton. La instrua esplora grupo de loeso sub la gvido de prof. Qian Ning esploris la leĝon de sedimentiĝo de la Flava Rivero, la dua granda rivero de Ĉinio, kaj trovis, ke la aluvio en la malsupra riverlito konsistas ĉefe el dikaj sabloj. Laŭ tiu trovo oni povas malgrandigi la areon de akva kaj tera konservado de 430,000 kvadrataj kilometroj al 50,000-100,000.

INSTRUA KAJ SCIENC-ESPLORA CENTRO

Laŭ la postulo de la ŝtato al la ĉefaj universitatoj, ke ili devas esti centro instrua kaj samtempe scienc-esplora, Qinghua-universitato faris kuran sciencan esplora-

radon de pluraj fakoj kaj atingis certajn sukcesojn en esplorado de fundamentaj teorioj kaj aplikaj sciencoj.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, la instruistoj kaj studentoj de la universitato faris esploraĵojn de ĉ. cent scienc-esploraĵoj objektoj kaj sukcese plenumis nombron da scienc-esploraĵoj, produktaj kaj projektaj objektoj, kiuj atingis la enlandan aŭ internacian nivelon, ekz. programe kontrola frezmaŝino, eksperimenta atomreaktoro, sinteza amoniako ktp. Krome, ili projektis Miyun-akvokonservejon en la ĉirkaŭurbo de Beijing, partoprenis en la projektado de la Popola Halo, la Ĉina Historia Muzeo kaj la Ĉina Belarta Halo kaj ricevis laŭdojn de ĉinaj kaj alilandaj fakuloj.

74 scienc-esploraĵoj fruktoj de Qinghua-universitato ricevis laŭdojn en la 1978-a Tutlanda Scienca Kongreso. En la lastaj jaroj ĝiaj 72 scienc-esploraĵoj fruktoj ricevis premiojn por inventado.

Rektoro Liu Da prezentis al mi sukcesojn kaj kontribuojn faritajn de ĝiaj diplomitoj sur diversaj frontoj post la Liberiĝo.

Li diris, ke Lin Zongtang, kiu estis vicĉefinĝeniero en fabrikado de la unua 12,000-tuna hidraŭlika premilo de nia lando, estis unu el la unuaj diplomitoj de la universitato post la Liberiĝo kaj nun fame konata fakulo de mekanika inĝenierado de nia lando. Ankaŭ Dong Xinju, vicestrino kaj vicĉefinĝenierino de la Beijing-a Geologia Buroo, kaj Xu Qian, vicestrino kaj ĉefinĝenierino de la petrolo rafinejo de la Shengli-a Olekampo, estis ĝiaj diplomitoj post la Liberiĝo.


BONDEZIRON AL LA PATRINA UNIVERSITATO

La diplomitoj de Qinghua-universitato sin trovas ĉie en la tuta lando, kaj iuj el ili laboras eksterlande.

La fame konataj ĉinaj fizikistoj Qian Xuesen, Qian Sanqiang kaj Zhou Peiyuan, matematikistoj Xiong Qinglai, Hua Luogeng, Duan Xuefu kaj Zhao Fangxiong, kemiisto Zhang Zigao, arkitektoj Liang Sicheng kaj Yang Tingbao, mekanikisto Wu Zhonghua, fame konataj profesoroj Zhang Guangdou kaj Shi Jiayang, ĉiuj estis diplomitoj de la universitato. Plejparto el ili partoprenis la 70-jaran jubileon. La fama sciencisto Gao Shiqi paralizita venis en rulseĝo al la celebra kunveno. Renkontiĝante post longa disiĝo, la eksstudentoj vokis unu alian per kromnomo de studenta tempo. La atmosfero estis tre arda.

Ankaŭ la famaj usonaj sciencistoj Tsung-dao Lee, Chenning Yang kaj aliaj estis diplomitoj de la universitato. Antaŭ la celebrado, la universitato sendis invitajn leterojn al siaj antaŭaj studentoj kaj instruistoj en kaj ekster la lando inkluzive de tiuj en Taiwan (Tajvan). Multaj personoj, kiuj ne povis veni al la celebrado, sendis al la patrina universitato leterojn, telegramojn, poemojn, pentraĵojn aŭ fakajn verkojn por esprimi sian gratulon. La diplomitoj de Qinghua-universitato en Usono sendis siajn reprezentantojn al la jubileo de la universitato.


La revenintaj diplomitoj kaj la nunaj instruistoj kaj studentoj de la universitato konstruigis en la ĝardeno de Qinghua monumenton kaj plantis apud ĝi pinojn por esprimi sian bondeziron, ke la patrina universitato por eterne prosperu kiel pino.



Prof. Shi Jiayang (maldekstre) kompiilas lerno'ibron por studentoj.




Antaŭaj diplomitoj Zhao Fangxiong (la dua de dekstre), Qian Xuesen (la kvara de dekstre) k.a. partoprenas en celebrado de la 70-a datreveno de la fondiĝo de la universitato.



Biblioteko de Qinghua-universitato

Vojo al sukceso



Tong Fei

UNU sola ĉina gimnasto Tong Fei partoprenis en la grandpremia gimnastika konkurso en Parizo en la lasta februaro, kiu okazas en ĉiu dua jaro. Li gajnis la viran ĉiurondan subĉampionecon kaj tri orajn, unu arĝentan kaj unu kupran medalojn en ses individuaj konkursoj.

Iu pariza influa sporta gazeto dediĉis okulfrapan paĝon por raportoj pri la sukceso de tiu juna ĉina gimnasto. Ankaŭ iu franca televida stacio prezentis lin al la rigardantoj. Kaj lia nomo diskoniĝis inter la eŭropaj gimnastikaj rondoj.

Tiu konkurso estis aranĝita de la franca Gimnastika Asocio "Antaŭenmarŝo". Eminentaj mondaj gegimnastoj estis invititaj al la konkurso ĉiujfoje. Ĉi-

jara konkurso estis la sesa, partoprenata de 28 gegimnastoj el 15 landoj. Kaj Tong Fei partoprenis en la konkurso sub tre malfavoraj kondiĉoj, ĉar tuj post lia atingo de Parizo lin trafis trafika akcidento survoje al la hotelo. Tamen li, vundita, kun doloro partoprenis en la konkurso en la tria tago.

Tong Fei, 19-jara, estas nova ĉina gimnastika stelo. En 1980 li gajnis premion en la Hartforda Internacia Gimnastika Invita Konkurso, kaj poste, en la sama jaro, li gajnis la viran ĉiurondan ĉampionecon en la Ĉina Gimnastika Ĉampionecon Konkurso. Kaj kiel li progresis en sia tekniko?

Li naskiĝis en artistia familio. Liaj gepatroj, unu frato kaj unu

fratino estas dramatoroj kaj alia frato — dancisto, kaj li aspiris esti gimnasto. Li estis akceptita kiel gimnasto ja hazarde. Iun tagon mi venis al gimnastika trejna domo en la orienta antaŭurbo de Beijing (Pekino) kaj tie mi intervjuis trejniston Zhang Jian, kaj li rakontis al mi pri Tong Fei antaŭ ok jaroj.

Tiam la Sporta Lernejo de Jiangxi (Gianghi)-provinco volis varbi knabojn al gimnastiko, pro tio Zhang Jian vojaĝis preskaŭ tra la tuta provinco. Inter ĉ. 20,000 knaboj li elektis nur dekelkajn, tamen li ne montris plenan kontenton pri ili. Li gajnis foje ĉiurondan gimnastikan ĉampionecon de Ĉinio sed neniam la mondĉampionecon. Li tre volis doni sian fakan sperton al la nova generacio por kulturi kelkajn gimnastikajn stelojn. Iutage, donante lecionon al knaba gimnastika grupo, li rimarkis ke iu knabo ekster la pordo absorbite rigardas internen. Komence trejnisto Zhang ne donis grandan atenton al tio, sed en du horoj la knabo restis tie senmove. La trejnisto trovis lin tre interesa kaj mansvingis al li, ke li eniru. "Kio estas via nomo?" "Tong Fei." "Kian




Tong Fei kaj lia trejnisto Zhang Jian

aĝon vi havas?” “Mi estas 11-jara.” Rigardante liajn plaĉan vizaĝon, longajn brakojn kaj gambojn, li pensis, ke tiu knabo tre taŭgas por esti gimnasto, kaj demandis: “Ĉu vi ŝatas gimnastikon?” “Jes!” definitive respondis la knabo. “Ĉu vi scipovas transkapiĝi?” ĝoje demandis la trejnisto. Kaj Tong Fei tuj faris kelkajn flankajn transkapiĝojn. Trejnisto Zhang diris kontente: “Lerno de gimnastiko bezonas diligentan ekzercadon en ĉiu tago. Tio tamen estas ŝvitiga sporto. Ĉu vi timas?” “Nenio timinda! Ankaŭ miaj gepatroj sin ekzercas ĉiutage!” La trejnisto ege kontentiĝis, trovinte tiun knabon multe preferinda. Fakte, antaŭ tio la knabo ja plurfoje venis tien por rigardi, tamen ne vekis atenton de aliaj. Post tio trejnisto Zhang petis konsenton de liaj gepatroj kaj lernejo kaj oficiale akceptis lin.

Ju pli forte li amis Tong Fei, des pli severa li estis al la lasta. Li ordonis, ke Tong Fei notu ĉiutage sian trejniĝon en taglibro, kaj li mem donis detale siajn rimarkojn pri la notoj kaj konstante montris liajn mankojn kaj kion li devas fari.

Gimnastika trejniĝado estis afero nefacila por Tong Fei, ĉar nura transkapiĝo neniam faras gimnastikon. Liaj gamboj kaj ventro-muskolo havis forton negrandan kaj tial estis malfacile por li lerni bazajn gimnastikajn movojn. Kelkfoje li devis duonhore stari sur la manoj sin apogante al muro por fortigi siajn brakojn, tutkorpe ŝvitante. Foje dum lia ekzerciĝo sur ansa ĉevalo deŝiriĝis haŭtoj duloke sur lia mankavo kaj la sanga vundo doloris lin tiel, ke li hezitis antaŭ la ĉevalo atendante la



Tong Fei ekzercas sin en duringado.

ordonon de la trejnisto pri ĉesigo. Sed trejnisto Zhang diris kategorie: “Daŭrigu!” Tiam Tong Fei denove saltis sur la ĉevalon kaj rekomencis turnadi rapide siajn gambojn por unu, du, tri sekundoj. Subite li eksentis akran doloron kaj falis de sur la ĉevalo, sed li tuj resaltis sur ĝin kaj faris denove la samon.

La laciga trejnado influadis lian volon. Iam li pensis forlasi tian malkomfortan sporton. Sed trejnisto Zhang konstante kuraĝigis lin havigi al si altan aspiron gajni gloron por la patrolando, persisti en kaj strebi al brilaj sukcesoj. Kun kresko de la aĝo, Tong Fei levis iom post iom sian konscion. Li rigardis trejniĝadon kiel plezuron en la vivo. Li streĉis sian energion por trejniĝo eĉ en ferioj kaj festotagoj. Kelkfoje lia patrino volis reteni lin hejme pli longe, sed ne sukcesis. Interparolante kun aliaj, li strange sin movadis: li faris aŭ saltojn, aŭ rotaciojn, aŭ pozon kapti paralelon. Foje la patrino

kuiris por li kokon kaj diris: “Manĝu! Tio utilas al via sano.” “Ne, ni havas nian propran menuon, kaj devas sobre preni manĝon,” rifuzis Tong Fei kapskue.

Mi renkontis Tong Fei en la trejna domo. Ŝajne tiu junulo iom infaneca ne kutimiĝis al intervjuo, kaj hontas paradi per sia sukceso. Plurfoje li diris, ke li ne bone ekspluatis sian lertecon en la konkurso en Parizo. Sed mi informiĝis de lia trejnisto, ke lia poento estas malpli multa ol tiu de la ĉampiono nur je 0.05. Tong Fei montris al mi ŝvelaĵon sur sia dekstra vango kaj diris, ke de la lasta pli ol unu monato post la trafika akcidento en Parizo li ofte suferas de kapdoloro, sendormeco kaj reduktiĝo de la forto. “Kial do vi ne ripozas?” demandis mi. Li nur ekridis kapskue.

Honoro naskiĝas el granda klopodo. Mi pensas, ke eble tio estas la kaŭzo, kial Tong Fei sin trejnis senhalte malgraŭ sia vundiĝo.

BRAZILO— GRANDA SUD- AMERIKA LANDO

BRAZILO estas la plej granda lando en Latin-Ameriko. En la komenco de la 16-a jarcento, portugala ekspedicio trovis tiun sennoman kontinenton kaj poste Portugalio prenis ĝin kiel sian kolonion. En tiu lando koloniistoj trovis grandarean brazilarbaron. El tiuspeca arbo oni povis ekstrakti tinkturon, kiu estis konsiderata tre valora siatempe, tial ĝi famiĝis tra Eŭropo kaj oni nomis la landon de brazilarbo Brazilo.

Brazilo situas en la orienta parto de la sudamerika kontinento, havas areon de pli ol 8,500,000 kvadrataj kilometroj nome du kvinonojn de la totala areo de Sud-Ameriko, kaj estas la kvina granda lando de la mondo laŭ areo. Ĝiaj landlimoj tuŝas ĉiujn sudamerikajn landojn escepte de Ekvadoro kaj Ĉilio. Ĝia marbordo longas pli ol 7,400 kilometrojn kaj havas multajn bonajn havenojn kaj golfojn.

La tuta ĝia topografio ondas denorde. En ĝia nordo troviĝas la Gvajana Altebenajo, sude de ĝi estas la Amazona Ebenajo, kiu okupas trionon de la totala areo de Brazilo, pli sude — la Brazila Altebenajo. En Brazilo

kruciĝas riveroj, inter kiuj la ĉefaj estas la riveroj Amazono, Bananal kaj Sao Francisco. Antaŭ nelonge usonaj geologoj faris al Amazono mezuradon kaj konstatis, ke ĝi longas 6,751 kilometrojn kaj estas la plej longa rivero en la mondo. Ĝi havas pli ol 500 branĉojn kaj la areo de ĝia baseno estas pli ol 7,000,000 kvadrataj kilometroj, la navigeblaj partoj de la Amazona riversistemo longas je 25,000 kilometroj. Brazilo estas riĉa je akvo-energio, nur tiu de Amazono jam superas cent milionojn da kilovattoj, kiu ĝis nun ankoraŭ ne estas ekspluatata.

La abunda pluvo, humida kaj varma klimato, multa kaj forta sunumado kreis favorajn naturajn kondiĉojn al la plantoj de la amazona regiono, ke tie troviĝas la plej grandaj tropikaj arbaroj en la mondo kun areo de pli ol 3,300,000 kvadrataj kilometroj, t.e. ĉ. duono de la totala areo de la sudamerikaj arbaroj. En tiuj arbaroj kreskas tre multaj specoj de plantoj, inter kies pli ol 40,000 specoj de altklasaj plantoj estas 12,000 specifaj specoj. Ekz. iuspeca arbo kun sveltaj branĉoj havas vivipovon radikigi je surteriĝo, tial ĝi estis nomata iripova arbo.

Brazilo havas 118,000,000 loĝantojn kaj okupas la sesan lokon de la mondo laŭ la loĝantara nombro. 62% de ĝia loĝantaro estas blankuloj, 11% nigruloj kaj 27% indianoj, mestizoj kaj mulatoj. En la pasintaj pli ol 400 jaroj, la lokaj indianoj, blankuloj kaj nigruloj el Afriko vivis kune kaj formis la nunan ras-konsiston.

Brazilo estas unu el la ekonomie relative evoluintaj landoj de Latin-Ameriko. En la pli ol 30 jaroj post la Dua Mondmilito,

pro la relative granda rapideco de ekonomia evoluo, aperis miraklo en brazila ekonomio.

Post 1947 la brazila ekonomio havis relative grandan disvolviĝon. En 1956 Brazilo ellaboris la unuan programon de ekonomia disvolviĝo, ĝis 1960 la enlanda produktovaloro meznombre pliiĝis je 7.8% ĉiujare. La “ekonomia miraklo de Brazilo” aperis inter la jaroj 1968-1973, la proporcio de ĉiujara pliiĝo superis 10%. Post 1974 ĝia ekonomia disvolviĝo malrapidiĝis, influate de la monda ekonomia krizo, precipe la prezaltiĝo de petrolo. Sed ĝia proporcio de ĉiujara pliiĝo ankoraŭ superis 6.87%. Ĝia enlanda produktovaloro leviĝis de 54.3 miliardoj da usonaj dolaroj de 1963 al la nunaj 200 miliardoj, tial ĝi fariĝis la deka granda lando en ekonomio de la mondo. En la sama tempo la meznombra produktovaloro de ĉiu loĝanto pliiĝis pli-ol-duoble. La kvanto de ĝia eksterlanda komerco pliiĝis dekoble en dek jaroj.

Brazilo havas fekundan teron taŭgan por disvolvi agrikulturon kaj brutobredadon. La agrikulturo kaj brutobredado okupas gravan lokon en la nacia ekonomio de Brazilo. En 1977 la totala valoro de ĝiaj eksportitaj agrikulturaj kaj brutaj produktaĵoj konsistigis 60% de la totala eksporto-valoro. Brazilo estas la dua eksporta lando de akrikulturaj produktaĵoj en la mondo post Usono. La produktokvantoj de iuj ĝiaj ĉefaj agrikulturaj plantoj okupas unuajn lokojn en la mondo: kafo — la unuan lokon, sojfabo, kakao kaj sukero — la duan lokon kaj maizo — la trian lokon.

Ĝia peza industrio havas historion de nur 20 jaroj, sed la

Ĉe la Rokmuro

Chibi

En la aŭtuno de la kvina jaro de Juanfeng (la erao de la imperiestro Shenzong de Song-dinastio, t. e. 1082 p. K.), la deksekan de la sepa monato (laŭ la luna kalendaro), mi kaj kelkaj gastoj suriris barkon ĉe la Rokmuro Chibi de Jangzi-rivero por amuzi nin. Freŝa venteto lante alblovigis; eĉ ondetoj ne leviĝis. Mi levis pokaletan kaj proponis vinon al la gastoj, kaj recitis versojn el la poemoj pri klara luno kaj junulina beleco. Baldaŭ la luno leviĝis super la orienta monto, migris inter Sagitario kaj Altajro. Blanka nebulo disvastiĝis kiel pruj-

no super la riverego, kaj la diafana glimbrilo de la akvo kunfandiĝis kun la ĉielo. Ni lasis la barketon drivi kiel folio, laŭ la senfina riverego. Mi sentis, kvazaŭ mi ŝvebus el la aero, veturus sur vento ne sciante kien, flosus leĝere en la vakuo kaj forlasus la mondon, forgesante ĉiujn zorgojn surterajn, kaj flugus alten en la ĉielon.

Ni drinkis kaj ekstaziĝis. Takte frapante la ŝiprandon, mi ekkantis: "Per remilo mi frapas la lunon sur la akvo, kaj kontraŭiras la fluantan lunlumon. Vaste etendiĝas mia penso, kaj mi sopiras belulinon en la

memproviza proporcio jam atingis 70%. En 1979 Brazilo produktis 13,800,000 tunojn da ŝtalo, t.e. 40% de la ŝtala produktokvanto de Latin-Ameriko, kaj okupas la 13-an lokon de la mondo. Ĉiujare Brazilo fabrikas 1,110,000 aŭtojn, kiuj okupas la unuan lokon de la aŭto-produkta kvanto en Latin-Ameriko, kaj tiel Brazilo fariĝis unu el la dek grandaj landoj de aŭtoproduktado. Brazilo nun povas eksporti aŭtojn al la triamondaj landoj kaj aŭtajn maŝinpartojn al Usono kaj FR-Germanio. La ŝipkonstrua industrio de Brazilo okupas la duan lokon de la mondo en akcepto de mendoj pri ŝipoj. La komercaj eskadroj de Brazilo okupas la unuan lokon en la suda hemisfero.

Krome, ĝi havas relative disvolviĝintajn industriojn de aviado, kemio kaj ilmaŝina fabrikado. Ĝi estas la dua fereroeksporta lando de la mondo post Aŭstralio.

Tamen, ankaŭ Brazilo, kiu kreis ekonomian miraklon, frontas tre grandajn malfacilojn. Ekz. en pluraj sinsekvaj jaroj aperis malfavora saldo de internaciaj pagoj, inflacio kaj granda nombro da senlaboruloj. Brazilo estas lando malriĉa je petrolo, ĝia memproduktita petrolo konsistigas nur 15% de ĝia bezonata kvanto, tial ĉiujare ĝi devas elspezi grandkvantan valuton por importi petrolon. En 1980 la valuto elspezita de Brazilo por tio superis 10 miliardojn da usonaj dolaroj.



苏轼画像 方隆昌画

La portreto de Su Shi
Pentrita de FANG LONGCHANG

fora ĉielo." Unu el la gastoj estis lerta en ludo de fluto, kaj li agordis ĝin al mia kanto. La tono sonoris

Por venki tiujn malfacilojn, la brazila registaro alprenis kontraŭrimedojn. Ekz. por solvi la malfacilon kaŭzitan de la petrolo krizo, ĝi klopodas esplori kaj utiligi novajn energifontojn. En utiligo de alkoholo, akvoenergio, atomenergio kaj aliaj, ĝi prezentis "brazilan tipon", kio vekis atenton ĉe diversaj landoj. Nun Brazilo konstruas la plej grandan hidroelektrejon en la mondo — la hidroelektrejon Itapu.

En la lastaj jaroj, la amika rilato inter Brazilo kaj Ĉinio havis disvolviĝon. Ni deziras, ke la brazila popolo gajnu novan sukceson en disvolvado de la nacia ekonomio kaj solvo de la frontataj malfaciloj.

lamente kaj sopire, plore kaj plende. La resonado postrestis longe, feble, seninterrompe kiel fadeno. Ĝi kva-zaŭ instigus drakon danci en profunda akvo, aŭ plorigus vidvinon en foliosimila barketo.

Mi malĝojigis, seriozigis kaj demandis al gasto: "Kial vi ludas tiel malgajege?" La gasto respondis: "Klara estas la luno, pokaj estas la steloj, kaj suden forflugas pigoj" — ĉu tiuj ne estas la versajoj de Cao Mengde? De ĉi tie videblas Xiakou okcidente, kaj Wuchang oriente. Montoj kaj riveroj interplektiĝas ĉirkaŭe, kaj arboj kreskas dense verdante. Ĉu ne estis ĉi tie, kie Mengde estis venkita de Zhou Yu? Kiam li konkeris la regionon Jingzhou, subigis la urbon Jiangling kaj direktis sian eskadron orienten laŭ la fluo, liaj batalŝipoj sin sekvis je mil lioj kaj la standardoj flirtis kovrante la ĉielon. Tiam li verŝis vinon en la riveron kaj verŝis poemon, tenante sian halebardon transverse antaŭ si. Siatepe li ja estis la plej elstara heroo en la periodo. Sed ho! Kie

nun li estas? Kaj cetera, efemeraj estas ni, kiuj fiŝas kaj hakas branĉojn ĉe la rivero, vivas kun fiŝoj kaj cervoj, kaj fojrefoje suriras la folio-similan barkon kaj kune drinkas, dum ni lasas nian efemeran vivon al la ĉielo kaj la tero, egalan al unu el miliograjnoj enjetitaj en la vastan oceanon. Mi bedaŭras la kurtecon de mia vivo, envias la eternecon de la granda rivero. Mi volus ĝojludi brakon en brako kun feoj kaj eterne vivi kun la luno en mia sino, sed mi ja scias, ke tio estas neniel atingebla. Pro tio mi esprimis mian esperon per la resonado de la fluto."

Mi diris: "Ĉu ankaŭ vi scias pri la akvo kaj la luno? Estas dirite, ke ĉio pasas kiel la fluo, sed tamen la elemento neniam forpasas; kaj ankaŭ estas dirite, ke ĉio, kio kreskas kaj velkas, estas kiel la lunfazo, sed tamen la astro mem neniam pligrandiĝas aŭ konsumiĝas. Se oni rigardus ĉion de la flanko de ŝanĝiĝo, tiam eĉ la ĉielo kaj la tero ne povus resti tute samaj eĉ unu mo-

menton. Sed, se oni rigardus ĉion de la flanko de konstanteco, tiam ĉiuj materioj kaj niaj memoj neniam perdiĝus. Do, ni ne devas envii ion ajn. Nu, ĉiuj estajoj inter la ĉielo kaj la tero apartenas al siaj respektivaj posedantoj. Ni ne devas preni eĉ la plej malgrandan parton de io ajn, krom se ĝi apartenas al ni mem. Nur la freŝa vento super la rivero kaj la klara luno super la montosuproj apartenas al neniuj, kaj kiam niaj oreloj kaptas la venton, ĝi fariĝas ĉarma muziko; kiam miaj okuloj renkontas la lunon, ĝi fariĝas bela bildo. La ĝuadon neniuj malpermesas kaj la utiloj neniam elĉerpiĝas. Oni nomas tiujn la neelĉerpeblajn trezorojn de la Kreinto, kaj ni povas senĝene ĝui ilin."

La amiko ĝoje ridis, kaj ni denove daŭrigis drinki. Baldaŭ la almanĝaĵoj tute konsumiĝis, nur la pokaloj kaj la pladoj estis haose dismetitaj. Ni ekdormis apogante unu la alian en la barko kaj tute ne konsciis la matenruĝon.

Trad. SĜER UJEKI

Unu el la gastoj estis lerta en ludo de fluto, kaj li agordis ĝin al mia kanto.

Pentrita de WEI ZAIYUN



Postnoto:

Su Shi (1037—1101), kromnomita Ermito Dongpo, estis fama eminenta literaturisto en la ĉina literatura historio. Liaj poemoj kaj prozoj karakteriziĝas per senĝena stilo, harmonia mikso de priskribado de pejzaĝoj kaj korstatoj, kaj havas fortan infekton.

Japana esperantisto S-ro Siger Ujeki, kiu esperantigis la poemon en prozo "Ĉe la Rokmuro Chibi" de Su Shi, esperantistiĝis en 1973 kaj nun havas la aĝon de 65 jaroj. Lin interesas la ĉina literaturo, precipe verkoj de Lusin kaj Bakin. En siaj lernejaraj jaroj li ekkonis la ĉinan literaturon. En la letero al ni li diris: "Mi esperas al vi ĉinaj esperantistoj traduki kaj eldoni ĉinajn klasikojn kun alta valoro, instigite de miaj mallertaj tradukadoj."

La postan parton de la poemo en prozo ni aperigos en la venonta numero.

Vizitgrupo de ELNA en Ĉinio

En diversaj lokoj de Ĉinio

Fotoj de LI WEIYI

La Vizitgrupo de Esperanto-Ligo por Norda Ameriko kun 16 membroj faris 20-tagan viziton al Ĉinio. Ili ne nur ĝuis naturajn pejzaĝojn de diversaj lokoj kaj pririgardis fabrikojn, vilaĝon kaj lernejojn, sed ankaŭ kontaktiĝis amike kun lokaj esperantistoj.




La vizitgrupo en la You'anmen-a Unua Elementa Lernejo en Beijing



Sur la Okcidenta Lago en Hangzhou

En Guilin





En la parko Huqiu en Suzhou



Gastado ĉe kamparano en Malu-komunumo de Shanghai

Intervidiĝo kun Beijing-aj esperantistoj


Dum restado en Ĉinio niaj usonaj amikoj kunsidis respektive kun samideanoj de la Pekina Esperanto-Asocio kaj la redakcio de EPC. Ili reciprokis amikecon kaj montris komunan deziron plifortigi solidarecon kaj kunlaboron inter la ĉinaj kaj usonaj esperantistoj. Usonaj amikoj ankaŭ prezentis bonajn opiniojn pri eldonaĵoj de EPC.

Ĉefredaktoro de EPC Zhang Qicheng donas salutvortojn en la kunsido.






Vizito al la Maŭzoleo de Sun Jatsen — fama pitoreskejo de Nanjing



Malgranda ekspozicio de ĉinaj esperantaĵoj eldonitaj en la lastaj jaroj




En la kunsido okazigita de la Pekina Esperanto-Asocio



Donacajo de la redakcio de EPĈ al la gastoj

73-jara huj-a maljunulo Ma Zhenwu prezentas ĉinan luktarton "Luo-hanquan" kun forta nacia karaktero.

Foto de YANG CHANGZHONG



Arkopafado estas unu el la ŝatataj sportoj de ĉinaj va-aj junuloj kaj ofte aplikata en ĉasado.

Foto de WANG HONGJUN



ANTAŬ cent jaroj, la 25-an de marto 1881 naskiĝis unu el la plej grandaj komponistoj de la XX-a jarcento, la eminenta muzikologo kaj pianisto Bela Bartok.

BELA BARTOK

(1881—1945)

JENO ZAGONI (Rumanio)

Li naskiĝis en Nagyszentmiklos (rumane: Sînnicolau Mare). Nur 9 jarojn li havis, kiam mortis lia patro. En 1899 la familio translokiĝis al Pozsony (nun Bratislava), kies vigla muzika vivo stimulis la direktan inklinon de la talenta junulo. En 1899 li enskribiĝis al la budapeŝta Muzika Akademio. Post du jaroj komenciĝis lia nekomparebla pianista kariero. Por fini siajn studojn li vojaĝis al Parizo. La franca ĉefurbo kaj ĝia intelekta kaj artista vivo pozitive influis la junan muzikiston. Hejmen reveninte, kune kun sia amiko kaj talenta kolego Zoltan Kodaly, en 1906 li komencis studi kaj kolekti hungarajn popolmuzikaĵojn. Ĉar en lia patrolando, kunvivis rumanoj, hungaroj, germanoj kaj aliaj naciaj, Bartok lernis respekti ĉiujn popolojn. Li ne nur respektis ilin, sed ankaŭ alproprigis iliajn lingvojn kaj muzikkulturon. Li studis kaj eldonis multajn verkojn pri la popolmuziko de tiuj nacioj. En 1907 oni nomumis lin universitata profesoro ĉe la budapeŝta Muzika Akademio. De tiam, lia komponista, scienca kaj kulturpolitika aktiveco ne povis esti disigita de la muzika folkloro. Dum kelkaj jaroj uzante popolmelodiojn kaj infankantojn li komponis fortepiano-ciklon por infanoj, la operon “Kastelo de Blubarba Duko”, kiu estas unu el la plej popularaj pecoj de la literaturo de la XX-a jarcento, kaj la baleton “La Ligna Reĝido”. Intertempe li kunfondis la Novan Hungaran Muzikan Unuiĝon, kies celo estis disvasti-

gado de la moderna muziko, kaj liajn verkojn eldonis “Universal Edition”, tiel la tuta mondo estis malfermita antaŭ li. Ekde 1920, li rekomencis la sukcesajn eŭropajn kaj transoceanajn koncertojn. Preskaŭ ĉiujare li komponis novajn verkojn. Inter ili la plej konataj estas “Cantata profana” (Naŭ mirindaj cerboj) kaj la “II-a Fortepianludo”. En 1937 li partoprenis en kolektado de folkloro en Turkio kaj samjare li aperigis la kolekton de 153 pianaj etudoj “Mikrokosmos-on”. Aŭtune de 1940, pro la fortiĝanta faŝismo, li forlasis sian patrolandon kaj translokiĝis al Usono. Post kvarjara silento, tie li komponis la koncerton, kiu estas unu el la plej grandaj pecoj de la XX-a-jarcenta muzikarto universala. Li esperis, ke post la Dua Mondmilito li povos hejmen reveni, sed la sorto alimaniere decidis: la 26-an de septembro 1945, la genia komponisto mortis en Novjorko.

Sesdek kvar jarojn li vivis, sed kiajn jarojn? Sen troigo ni povas aserti, ke ili estas signifaj en la mondhistorio. Bartok vidis la unuajn aviadilojn, li vidis kaj aŭdis la unuajn telefonojn kaj radioaparatojn, tiam komenciĝis la “atomepoko” kaj okazis ambaŭ mondmitoj, tiam aperis la unuaj socialismaj ŝtatoj. La tuta homaro transformiĝis dum tiuj sesdek jaroj. Tiun mondon plenan de antagonismo, oni ne plu povis esprimi per la

malnovaj iloj de la arto. Bela Bartok estis inter tiuj unuaj, kiuj trovis la novan esprimlingvon de la krizo kaj renaskiĝo kaj per tiu lingvo li verkis senmortajn klasikajojn, ĉefverkojn de la heroa lukto homara. De kiu li lernis tiun lingvon? De la popolo mem, de la popolmuzikoj hungara, slovaka, rumana, bulgara, turka, araba, kiujn studante li trovis la ŝlosilon de la muzika renesanco. Por Bartok la popolaj melodioj malfermis la mondon de la naturo kaj gvidis lin ĝis la radikoj de la vivo. En la popolkantoj li ekkonis la popolojn mem, iliajn aspirojn de libereco. Bartok asertis, ke nur tiu poeto povas esti libera, kiu heroldas la liberecon de la homaro. Tiel li povis esti ne nur ŝtormbirdo de la krizo, sed ankaŭ la heroldo de ĝia solvo kaj leviĝo. La moto de la verkoj de Bartok estas: “For de la infero, supren al la lumo.”

En Budapeŝto, Novjorko, Bukareŝto kaj Otavo, ĉie en kaj ekster Eŭropo, la civilizita mondo kun admiro honoras tiun eksterordinaran personecon de la hungara kaj internacia muzikarto. En grandaj koncertejoj de metropoloj oni prezentas liajn verkojn, oni organizas naciajn kaj internaciajn sciencajn kunsidojn, libroeldonejoj kaj filmproduktistoj el Rumanio, Hungario, Usono kaj Kanado eldonas plurnombrajn librojn kaj filmojn pri la vivo kaj verkaro de Bela Bartok.

La vivo kaj arto de Bela Bartok por ni restas modelo, al kiu nun kaj eĉ post jarcentoj povas veni ĉiuj, kiuj el pura fonto volas ĉerpi akvon. Li estas modelo por ĉiuj, kiuj en muziko vidas, aŭdas la rimedon, instrumenton de la interhoma rilato, la mesaĝon de la homaro.



ANTI-KVAJ FRESKOJ DE TIBETO

de HE QI

EN la temploj de la Tibeta Alt-ebenaĵo abundas koloraj antikvaj freskoj.

La arto de tibetaj freskoj devenas de budhismo. En la mezo de la 7-a jc. la tibeta reganto Sunzamkampo (617-650 p.K.) unuigis la tutan Tibeton kaj edziĝis sinsekve al la princinoj Chizun de Nepalo kaj Wencheng de Tang-dinastio. La du princinoj la unuaj enkondukis budhismon en Tibeton. La temploj Zulakang kaj Ramoche konstruitaj en Lhasa en 645-648 p.K. ja servis speciale al la du de ili alportitaj budhaj statuoj.

Post la finkonstruo de la templo Zulakang, Sunzamkampo invitis nombron da metiistoj de Tang-dinastio, Hindio kaj Nepalo por skulpti budhaj statuojn kaj fari pentraĵojn. Ĝis nun restas ankoraŭ freskoj en du lokoj: Du grupoj da krokizoj de militistoj troviĝas sur la muroj ambaŭflanke de la koridoro ĉe la enirejo de la centra halo de la templo Zulakang. Oni diris, ke ili estas verkoj de metiistoj de Tang-dinastio. La aliaj freskoj troviĝas en la ĉirkaŭa koridoro de la dua etaĝo de la nomita

halo. Laŭ diro ili estas pentritaj de nepalaj metiistoj.

En la komenco, la tibetaj freskoj estis pli multe influataj de Nepalo. Sed ekde la 12-a jc., ili multe asimilis la arton el la interna regiono de Ĉinio. La tibetaj freskoj nutritaj de la nacieca kreivo iom post iom formis sian propran stilon. La vestaĵoj de pentritaj feinoj evidente spegulas la influon de la silkajoj grandkvante enportitaj el la interna regiono.

En la komenco de la 15-a jc. t.e. en la epoko de Congkapa (1357-1419 p.K.), la kreinto de la flava sekto de lamaismo de Tibeto, la freskarto atingis la kulminon de sia disvolviĝo. Congkapa kaj liaj disĉiploj dum ĉ. 40 jaroj konstruigis tri grandajn templojn en Lhasa — Gedan, Zhebung kaj Sela kaj aliajn grandiozajn templojn kiaj la templo Barju en Gyaze kaj la templo Zhashilungpo en Xigaze. Ankaŭ la freskoj en ili estis grandaj. Congkapa kaj lia unua disĉiplo Banĉen la Unua ambaŭ posedis altan pentrarton. La tiamaj freskoj estis grandiozaj. La budha bildo en la granda sutra halo de la templo Baiju en Gyaze altas je tri metroj. En la ĉirkaŭa koridoro de la dua etaĝo estas pli ol 20 serioj da freskoj pri la renaskiĝoj de Budho, kiuj ĉiuj havas vastan scenon, striktan struk-

turon, vivecan plastikon dekoraciran kaj estis majstroverkoj de tiu periodo.

Meze de la 17-a jc., t.e. en la epoko de Dalai-lamao la Kvina, en multaj lokoj de Tibeto aperis pentrartaj societoj kaj la freskopentrado estis pli populara. Dalai-lamao la Kvina plurfoje faris aŭdiencon al pentristoj de societoj. La tibetaj freskoj ne limigis sin pri budhismo ĉu en la enhavo aŭ en la formo. La pentristoj komencis prezenti la historion kaj popolan vivon de sia nacieco per la freskoj. La tiama freska arto havis pli vastan bazon en la popolamasoj kaj ĝia nacieca stilo pli kaj pli maturiĝis.

La freskoj faritaj dum rekonstruado de la Potala Palaco estas la majstroverkoj de tiu epoko. Sur la ĉirkaŭmuroj de la halo Honggong de tiu palaco troviĝas freskoj pri la tuta vivo de Dalai-lamao la Kvina, el kiuj la plej okulfrapa estas la fresko, ke li ricevis aŭdiencon de la imperiestro Shunzhi (1638-1661 p.K.) de Qing-dinastio en 1652 p.K. en Beijing. La freskoj sur la dua-etaĝa galerio de Srid-Zhi-phuntshogs montras pejzaĝojn kaj morojn de Tibeto. Tie estas centoj da freskoj, inter kiuj iuj prezentas la rekonstruadon de la Potala Palaco, la

(Daŭrigata sur p. 34)

VENDADO DE KRABOJ

(Novelo)

KIAM orlaviĝas la spikoj de tri-
tiko, grasiĝas la kraboj. Vir-
krabo dika, krabino plena de fraĵo,
kaj eĉ la piedpintoj pleniĝas de kar-
no. Vaporumitaj freŝaj kraboj spici-
taj per iom da pistita zingibro kaj
vinagro ja estas bona plado por
drinkado.

En tiu marborda urbeto la kraba
foiro estas tre fama. En la lastaj
jaroj tien venis ĉiam pli multaj ho-
moj por somerumi kaj ripozi kaj
pro tio multe valoriĝis tiu “dekpieda
generalo”. Kiel multe ĝi kostas, ĝi
ĉiam trovas siajn aĉetantojn. Laŭ-
dire, ĝi ne nur estas bongusta kaj
nutra, sed ankaŭ povas kuraci mal-
sanon. . .

La 29-a de junio estis foira tago.
Frue komenciĝis krabvendado kaj
ankaŭ frue ĝi finiĝis, la kraboj for-
vendiĝis apenaŭ ruĝiĝis la orien-
to. Iuj el tiuj, kiuj ne sukcesis
aĉeti krabojn, foriris kun bedaŭro,
kaj aliaj restis tie por atendi novan
vendanton. Ofte okazas: Ŝipoj, kiuj
krabokaptas en malproksima maro,
revenas malfrue kaj kompreneble
ties kaptajoj aperas en la foiro mal-
frue, kaj tion bone scias ĉiuj, kiuj
ofte vizitas la foiron.

Inter la krabaĉetantoj estis okul-
frapa dikulo. Se li mallevas sian
kapon, li certe ne povas vidi siajn
piedpintojn pro sia elstara ventro.
Liaj maldensaj grizaj kapharoj estas
bonorde kombitaj malantaŭen. Sur
lia blanka kaj delikata vizaĝo trovi-
ĝas neniun sulketo. Li ne montris
malpaciencon kiel aliaj, male sen-

zorge fumis kaj iris tien kaj reen.
De tempo al tempo li levis sian ka-
pon kaj elblovis el la buŝo fuman
cirklon, kvazaŭ dirante: “He, atenu-
du, atendu ĝis la tagmezo! Malgraŭ
ĉio mi ne foriros!”

Iuj ne povis elteni la longan atenu-
dadon kaj fine foriris.

La dikulo ekrigardis la for-
irintojn kaj sur liaj buŝan-
guloj aperis kontenta rideto.
Maljuna kampulo maldika miksiĝis
inter tiuj krabaĉetantoj kaj li tute
ne harmoniis kun tiu malgranda
vicaro. Li, iom ĝiba, havas nigran
sulkoplenan vizaĝon, barbon sur la
vangoj kaj nebulajn okulojn kvazaŭ
kovritajn per tavolo da polvo. Li
aspektis kiel kaduka pina trunko.
Laŭ liaj krudaj vestoj oni jam scias,
ke li estas montano, ĉar loĝantoj ĉe
la marbordo ne portas ŝuojn tiajn
kiel la liajn. Li malpacienca pli
evidente ol ĉiuj aliaj kaj de tempo al
tempo ĵetis sian rigardon al la du
ekstremoj de la foiro. Li plurfoje
bruligis sian pipon kaj fumis kun
bruo.

La suno alte pendis sur la ĉielo.

Perdinte paciencon la maldika
kampulo alparolis la dikulon:
“Pardonon, kamarado, kioma ho-
ro?” Ne rigardante la kampulon la
dikulo senatente diris: “Kvarono
antaŭ.” “O, o, . . .” kapjesadis la
maljunulo. Efektive li tute ne
komprenis kioman horon signifas
tiu “kvarono antaŭ”, tamen li ne
volis ĝeni lin denove kaj nur in-
dulgeme ridis, kio dense sulkigis lian



vizaĝon. “He, he, kamarado, ĉu an-
koraŭ vendiĝos kraboj, laŭ via
opinio?” La dikulo rimarkis la mal-
dikan kampulon. Li palpebrumis kaj
per la malgrandaj okuloj pririgardis
la maljunulon de la kapo ĝis la pie-
doj, kaj sur lia vizaĝo tuj aperis
afabla rideto: “Maljuna kamarado,
ĉu vi volas aĉeti krabojn? Venu
morgaŭ! Hodiaŭ ne venos la varo,
iru hejmen. . .” “O, o, . . .” la
maljunulo dankis lin kaj retiriĝis. Li
suspiris, sed ne volis foriri. Li kal-
kansidiĝis kaj ekfumis la pipon.
Efektive, eĉ fajrero ne estis en la
forneto de la pipo.

Tio multe malĝojigis la dikulon
kaj nubo tuj kovris lian vizaĝon. Li
forte ekfumis cigaredon kaj denove
ekiradis tien kaj reen kun rapideco
multe pli granda ol antaŭe.

Atendantoj flustradis:

“Li volas, ke aliaj foriru, kaj li
mem restu. . .”

“Jam tro grasa, li tamen ankoraŭ
tiel frandema!”

“Ha, laŭdire kraboj povas kuraci
korpulentecon. . .”

Evidente la babiladon aŭdis la
dikulo. Li forte ĵetis teren la fu-
mantan cigaredan stumpon por es-
primi sian proteston.

“Ha, kun filtrilo!” iuj ekridis.

Bone, antaŭ ol koni la nomon de lia moŝto, ni nomu lin Filtrilo! Nenio malbona estis en tio, ĉar dikulo ne ŝatas ke oni priparolas lin dika. Rilate al la kampulo, se oni nomas lin Pipo, ŝajne li ne ofendiĝos de tio.

Tempo ne trompis la atendantojn. Vere venis krabvenda knabino, kiu vektoportas du korbojn plenajn de kraboj. La knabino balancis sian korpon kun ŝultro kliniĝinta pro premo, trairante homamason.

“Kraboj!” kriis la knabino irante. Aŭdinte ŝian sonorajn kaj dolĉajn voĉojn vi sentas ke en ŝiaj korboj la kraboj certe estas freŝaj kaj bon-gustaj.

Tuj svarmis al ŝi la aĉetantoj, iuj kun retsako kaj aliaj kun korbeto. Oni interpuŝis unu alian kaj neniu volis montri cedemon. Estis neatendite, ke Filtrilo kuris plej fronte. Lia pufa korpo fariĝis tiel facil-mova kaj vigla kaj eĉ du fortaj knabegoj estis flanken forpuŝitaj de li. Li kaptis la unuan lokon kaj kriis returninte la kapon: “Viciĝu! Ĉiuj viciĝu!”

Kion faras la Pipo? Li gapis momenton, poste, kiam li konsciiĝis pri la afero, li enpoŝigis sian pipon kaj provis alpaŝi por akiri lokon, sed la du korboj jam estis solide ĉirkaŭitaj. Li iris de maldekstre dekstren kaj de antaŭe malantaŭen, sed eĉ la kapon li ne povis enŝovi en la cirklon.

Sennombraj manoj kun monbiletoj etendiĝis al la knabino kaj leviĝis surdigaj krioj: “Al mi 3 ĝinojn (1 ĝino = 0.5 kilogramo)!” “Al mi 5 ĝinojn!” “Mia vico, por du juanojn!” “. . .”

La knabino senhaste demetis siajn korbojn. Ŝi ridetante levis sian kapon kaj puŝetis la kapharojn pendantajn antaŭ la okuloj post orejon kaj diris: “Ne urĝu, mi reakiru la spiron!”

“Jes, vidu, kiel laciĝis la kamara-deto kaj ŝi tutkorpe ŝvitegas!”

Filtrilo ridis eĉ pli dolĉe ol la knabino.

“Mi malsekiĝis ne de ŝvito, sed de nebulo,” sonore korektis lin la knabino. Ŝi prenis pesilon kaj forviŝis de sur ĝia stango folipecojn de marherbo por komenci vendadon.

“Jes, de nebulo, de nebulo!” ripe-tis Filtrilo. Li malfacile fleksis sian talion kun unu mano apogita sur la genuo kaj atenteme etendis la alian manon en la korbon.

“Gardu vin de pinĉado!” kriis la knabino.

Filtrilo tuj retiris timigite la manon.

Laŭaspekte la knabino havas ĉ. 15 jarojn kaj elspiras tutkorpe knabinan belecon: Sur franĝo da haroj sur ŝia frunto trembrilis rosoj; ŝiaj grandaj kaj brilaj okuloj kvazaŭ estus plenplenaj de rosoj; kaj ŝiaj pufaj vangoj ruĝaj de marblovo estis malseketaj. Ŝi estis kvazaŭ florburĝono en matenruĝo. Ŝi kun supren falditaj pantalon-tuboj kaj manikoj vidigis en si allogan junecon kaj krudecon. . .

“Aj!” ekkriis Filtrilo. Li fine ne povis sin deteni de kapto de la plej granda krabo kaj lia mano estis forte pinĉita. Li neniel povis sin liberigi de la pinĉado kaj lia vizaĝo misformiĝis de doloro.

La knabino elkore ekridis sonore kiel tintilo. Ekridis ankaŭ aliaj aĉetantoj kaj sekve tuj eksplodis ridego. La “dekpeda generalo” kvazaŭ volus montri sian malamon pro kaptiteco kaj pli forte pinĉis turnante siajn verdajn longajn okulojn. Filtrilo nenion povis fari krom krii “Aj, aj!”

La knabino sin detenis de rido kaj klakfrapis la kruston de la krabo kelkfoje per siaj dika kaj longa fingroj, kaj la krabo, kvazaŭ elektrofrapite, tuj malfermis siajn tenajlojn. Filtrilo rigardis sian fingron: ho, aperis sur ĝi du vicoj de sangaj segildentaj signoj!

Viŝante la larmojn pro ridado la knabino diris: “Vi meritas la punon pro la malpacienco!” kaj ŝi denove ekridis.

En granda konsterniĝo Filtrilo ofendite fingromontris la krabon kaj diris: “Mi volas ĝuste tiun! Ankoraŭ tiun inan, tiun ĉi. . .” Li unuspire elektis en la korbo 6-7 plej grandajn krabojn.

Iom hezitinte la knabino tamen pesis por li kaj diris: “5.2 ĝinoj, sume 2 juanojn kaj 86 fenojn ili kostas.” Ŝia pesado estis rapida kaj la kalkulo flua kaj ĝusta.

Sed Filtrilo ne prenis la krabojn, li rapide turnadis siajn malgrandajn okulojn kaj diris “Ne hastu, kiom kostas unu ĝino?”

“55 fenojn!”

“Knabino, hodiaŭ la sola foira prezo estas 45 fenoj! Vi ĉiuj diru, ĉu ne vere?” Filtrilo anheladis, rektigis la talion, metis siajn manojn sur la talio kaj grimacis per la okuloj turninte sian kapon posten. Kaj ankaŭ la aliaj aĉetantoj grumbliis pri la alta prezo de la kraboj.

La knabino aplombe ridetis: “Vi mensogas! Mi scias, ke hodiaŭ la foira prezo estas 50 fenoj.”

Stuporiĝinte longan tempon Filtrilo balbutis: “Eble vi diris la veron, sed ĝi estas malpli alta ol la via!”

“Koston decidu la varo!” La knabino demetis la pesilon, per du fingroj kaptis krabon je ĝia posta piedo kaj ĝin svingis en la aero. La krabo tuj ekmovis siajn piedojn, tamen ĝi neniel povis sin tuŝi per la tenajloj. “Rigardu, kiu alia havas tiel freŝajn krabojn. Mi kaj mia patro kaptis ilin en malproksima maro, manĝinte nenion dum la tuta nokto! Kia penado! Kapti krabojn ja ne estas tiel facile kiel ilin manĝi!” La voĉo de la knabino sonis iom raŭke pro laciĝo.

Ĉiuj silentiĝis.

Filtrilo ekbruligis cigaredon kaj senzorge ekfumis. Iu el la ĉirkaŭ-

starantoj diris kun simpatio: "Pretere iri sur monton ol krabokapti surmare!" Li estis neniu alia ol Pipo, kiu ne povas proksimigi sin al la korboj.

Post longa silento Filtrilo elŝprucigis buŝon da fumo kaj decideme diris: "52 fenojn, ĉu konsentite?"

La knabino rikanis.

"53 fenojn!"

La knabino tute ne rigardis lin kaj krucis siajn brakojn sur la brusto.

Filtrilo ruĝiĝis kaj eĉ lia voĉo iom tremis: "54 fenojn, ĉu vi kontenta?" Tion dirante li ĵetis la cigaredan stumpon teren kaj ĝin estingis per piedpremo. Poste li malfermis sian retsakon kaj malavare diris: "Enverŝu en ĝin, pli da kelkaj fenoj estas por mi ne grave!"

La knabino klinis sian pesilpladon kaj verŝis la krabojn en sian korbon: "Tenu vian monon. La kraboj estas miaj!"

Filtrilo koleriĝis. Li forte retiris la retsakon kaj ŝajnis sin forirona: "Mi aĉetos alies. Iru, ni ĉiuj iru!"

Ĉiofoje neniu lin sekvis.

"Kraboj!" denove eksonoris la dolĉa kaj klara voĉo de la knabino.

La aĉetantoj interpuŝiĝis. "Pesu por mi, mi havas gaston hejme!" "Kelkaj fenoj ne estas kalkulindaj!" "3 ĝinojn al mi!"

Komenciĝis la vendado de la knabino. Post mallonga tempo unu korbo jam malpleniĝis. Pesante ŝi de tempo al tempo ĵetis rigardon al Filtrilo kaj sur ŝiaj buŝanguloj pendis dolĉa rideto.

La vizaĝo de Filtrilo jen ruĝiĝis jen paliĝis. Li forte maltrankviliĝis vidante ke pli kaj pli malmultiĝis la kraboj en la korbo. Li sin turnis kaj denove sin klinis al la korbo malgraŭ la ventra doloro kaŭzita de kurbiĝo de la talio. Kaj spite al la danĝero esti pinĉita, li kaptis en la

mano 7-8 krabojn, tamen li nek lasis pesi ilin, nek ilin demetis.

Foriris krabaĉetintoj kaj restis nur Filtrilo kun kelkaj kraboj en la mano. Pro longa kurbiĝo de la talio, lia vizaĝo purpuriĝis kaj ŝvito defalis guto post guto. Li anhele diris: "He, kamaradeto, restis nur tiuj kelkaj kraboj post la elektado, iom malaltigu vian prezon, ĉu bone? . . ." Lia ridanta vizaĝo fariĝis kvazaŭ floro, liaj malgrandaj okuloj ritme palpebrumis, kaj kun preskaŭ petega mieno li atendis respondon de la knabino. Tiam alpaŝis Pipo. Filtrilo tuj forte maltrankviliĝis. Pipo diris: "Knabino, pesu al mi du." Filtrilo malafable ekrigardis la maljunulon kaj levis la krabojn: "Elĉerpiĝis, mi aĉetos ĉiujn restintajn." La knabino bedaŭre diris: "Onklo, jam estas finvendite." Pipo eksuspiris kaj diris: "Knabino, ne ridu pri mi . . . La patrino de mia filo suferas de kancero. . . Ŝi nun estas en hospitalo kaj ne vivos pli ol kelkajn tagojn. Ŝi nenion volas manĝi, krom krabojn. Cedigu al mi du! Aj, kompatinda virino suferinta dum la tuta vivo kaj eĉ mortante ne povos . . ." Larmoj nebuligis la okulojn de la kampulo.

La knabino firme premis sian buŝon kaj io brilis en ŝiaj okuloj.

Filtrilo deturnis sian vizaĝon.

Larmogutoj falis de sur la vizaĝo de Pipo, kaj li petis: "Estu kompatema."

Tute ne rigardante la maljunulon, Filtrilo nur urĝis la knabinon pesi la krabojn.

La knabino diris: "Cedu du! Mi vendos al vi je la prezo de 50 fenoj."

Cerbuminte momenton Filtrilo diris: "Ne, ne, mi aĉetos je la prezo de 55 fenoj, neniom malpli. Pesu, pesu!"

La lipoj de la maljunulo ekstremis pro kolero: "Knabino, ne ĝenu vin, mi ne aĉetos!" tion dirinte li sin turnis por foriri.

Filtrilo ekhezitis: "He, he, maljunulo. . ."

La knabino forte spiradis. Subite ŝi kuris kelkajn paŝojn antaŭen kaj retenis la maljunulon: "Onklo, iom atendu." Turnante sian kapon ŝi diris al Filtrilo: "Cedu tiujn krabojn al la onklo, kaj vi iru kun mi kaj prenu kiom vi volas, kaj la prezo estas 40 fenoj por 1 ĝino."

Filtrilo meditis kaj liaj malgrandaj okuloj brilis pli ol iam ajn antaŭe. Li estis en kalkulo kaj cerbumado. Li levis sian kapon kvazaŭ denove farinte gravan decidon: "Mi iros, se la prezo estas 35 fenoj." "Bone!" la knabino mordis sian lipon, kaj nur tiam Filtrilo formetis la krabojn heziteme.

Anstataŭ pesi la krabojn la knabino enigis ĉiujn krabojn en la retsakon de Pipo. Kun maltrankvilo la maljunulo kriis: "Mi volas nur du, nur du! . . ." La knabino diris: "Onklo, satmanĝu la onklino!"

"Tamen ne . . . ne sufiĉas mia mono," balbute diris Pipo. Li eten-



Ilustrita de LUO ERCHUN

dis sian manon en la poŝon, elprenis el ĝi malpuran kaj ĉifonan paketon kaj malvolvis ĝin, en kiu estas nur 5 juanoj. Li donis la monbiletojn al la knabino per mano iom tremanta.

La knabino akceptis nur 1 juanon.

Kun miro Filtrilo larĝe malfermis siajn malgrandajn okulojn.

Ruĝiĝis la vizaĝo de la maljunulo, li neniel volis akcepti la restintan monon: "Ne, tio ne decas kaj mi devas pagi laŭ la prezo. Mi scias, ke oni preferas iri sur monton ol krabokapti surmare. . ."

La knabino insiste metis la monbiletojn en la manon de Pipo: "Onklo, ne vin ĝenu, tio estas mia koro por la onklino. Se mi tion diros al mia patro, li certe konsentos kun mi. Ankaŭ mia patrino suferis tian malsanon kaj en la pasinta jaro ŝi . . ." larmoj aperis en siaj okuloj.

Per granda kruda mano la maljunulo forviŝis por ŝi la larmojn, dirante: "Bona knabino, ne ploru, ne ploru! Ĉiujn mi akceptas, ĉu vi kontentiĝas?" . . .

La knabino ekridetis kaj, forte frotante siajn okulojn, diris: "Tuj reiru, onklo, onklino vin atendas! Estas pli bone manĝi ilin dum ili estas ankoraŭ freŝaj."

Pipo fikse rigardis la knabinon kaj denove malsekiĝis liaj okuloj. Li levis sian manon kaj karesis la kapon de la knabino kvazaŭ tiun de sia filino. Li ne povis sin deteni de larmado kaj haste deturnis sian kapon.

Pipo fine foriris kaj lin sekvis la knabino per la okuloj.

Tiam Filtrilo, kiu fumis kun kapo deturnita, alpaŝis al la knabino, svingis sian grasan brakon kun horloĝo antaŭ la knabino, dirante: "Rigardu, jam estas la deka, ni iru preni krabojn!"

Silente starante momenton la knabino eklevis la malplenajn korbojn kaj iris ekster la foiron.

Filtrilo kuratingis ŝin kaj kaptis la tenilon de la korbo: "Vi trompis min kaj ankoraŭ provas forkuri? Kie estas kraboj?"

Returninte sian kapon la knabino mistere palpebrumis kaj kun rideto diris: "Vi sekvu min!"

Ili elpuŝiĝis el la homamaso unu post alia. Ili trairis grandajn kaj malgrandajn stratojn kaj videbliĝis antaŭ ili maro, ĉe kies bordo ankriĝis multaj ŝipoj.

"Nu, jen tie estas multaj kraboj!"

Filtrilo trankviliĝis kvazaŭ ŝtono defalus teren de sur la koro kaj kontenta rideto aperis sur lia vizaĝo. La knabino rapide iris kaj li malfacile ŝin sekvis kaj iam li ankoraŭ devis kureti por atingi ŝin. "Aj, kamaradeto . . ." forte li anhelis, "ĉu estas ĵus kaptitaj?" "Jes", la knabino kapjesis. "Por la ĵus kaptitaj kraboj vi devas iom favori al mi je la pesado." "Jes." "Aj, kamaradeto, ĉu vi povas vendi al mi je ankoraŭ pli malalta prezo, ĉar mi kuris . . . kuris tiom multe da vojo . . ." "Jes!" Nerimarkite la knabino denove postlasis Filtrilon kaj tiu ĉi denove devis kuratingi ŝin.

Ili surpaŝis plaĝon, kiu estis mola kiel kotona tapiŝo. Sur ĝi la knabino iris rapide kiel sago, dume ĝi multe suferigis Filtrilon. Apenaŭ la piedoj falis, ili profunde eniĝis kaj liaj ŝuoj pleniĝis de sablo.

"Aj, kamaradeto, iom malrapidu, malrapidu . . ."

Returninte sian kapon la knabino diris kun rido: "Iru rapide, tie estas kraboj." Filtrilo forte viŝis de sur sia vizaĝo ŝviton, spiregis kaj ŝin sekvis stumblante. Kuratinginte ŝin li kaptis la ligilon de la korbo por ke la knabino lin trenu.

La knabino haltis ĉe sampano. Filtrilo falsidiĝis surteren kaj senĉese spiregis.

La knabino senhaste demetis la vekton, frapetadis la renversitajn korbojn sur la plaĝo kaj ilin ĵetis

sur la boaton. Post tio ŝi saltis sur ĝin.

Filtrilo surpriziĝis: "Kie . . . kie estas kraboj?"

La knabino brue ekridis kaj eĉ de tio kurbigis ŝia talio. La ŝipeto turniĝis sur la akvo. Ŝi ekprenis postremilon kaj la ŝipeto glitis al la maro.

"Kraboj estas en la maro!" ŝi kriis sonore.

Nur tiam Filtrilo konsciis trompiĝon. Li stariĝis, sin ĵetis al la rando de maro kaj kriis piedfrapante la teron: "Revenu, revenu, ci knabinaĉo!"

La knabino remis senzorge kaj kontente kaj ekkantis fiŝistan kanton: Aj—

*Se vi volas sovaĝbirdojn,
iĝin kaptu en montaro;
se vi volas marproduktojn,
ilin kaptu en la maro. . .*

Filtrilo kolere ekprenis manplenon da sablo kaj forte ĵetis ĝin al la maro. Kiam li ripetis la faron, lia mano estis pikita de io. Mallevinte la kapon, li vidis grandan krabopinĉilon: ĝi estas elverŝita de la knabino el la korbo. Je plia serĉado li trovis ankoraŭ sufiĉe multe. Lasinte la knabinon flanken li haste levis ilin kaj metis en la retsakon. Li kalkulis en la koro: 16 pinĉilojn, 34 piedojn . . .

Malproksimiĝis la boato kun la kanto kaj poste tute malaperis. Sur la lazura maro restis nur belaj kaj blankaj onderoj . . .

* Wang Runzi 34-jara estas Weihai-ano de Shandong-provinco. Post diplomitiĝo en normala lernejo li laboris kiel instruisto en mezlernejo. Li komencis verki en 1970 kaj publikigis verkojn en 1972. Ekde 1974 li profesie okupiĝas pri verkado kaj publikigis novelojn, raportojn kaj poemojn. "Vendado de Kraboj" estis premiita kiel unu el la bonaj noveloj de Ĉinio en 1980.

NACIAJ KANTOJ K DANCOJ



Virina solo



La duopa danco "Ĝojo de Riĉrikolto"

Kantoj kaj Dancoj de Ŝe-oj

Ŝe-nacieco kun 330.000 membroj dislokiĝas en Fujian, Zhejiang, Jiangxi, Anhui kaj montregionoj de Guangdong kaj sin okupas ĉefe pri agrikulturo. Apartan karakteron havas vestaĵoj de ŝe-aj virinoj. En iuj regionoj ili kun spirala hararanĝo sur la kapo portas pantaloneton kun bunta zono kaj ĉirkaŭvolvas la kruojn per tolbendo. Iliaj kantoj kaj dancoj karakteriziĝas per nacia koloro kaj loka spiro.

La danco "Blankaj Orelfungoj"



Popolaj metiartaĵoj de Guizhou

Guizhou estas provinco kun multaj nacioj en la sudokcidenta parto de Ĉinio. Tie loĝas pli ol 4 milionoj da mjaŭ-oj, buĵi-oj, dung-oj, ŝuj-oj, ĵi-oj, huj-oj, golaŭ-oj k.a.

Ĉi tie ni prezentas metiartaĵojn de naciminoritatoj de Guizhou, kiuj inkluzivas ĉefe tinkturaĵojn kaj fajencaĵojn. Hodiaŭ kvankam granda ŝanĝiĝo okazis al la vivmaniero de tiuj naciecoj, tamen ili konservas siajn proprajn morojn kaj projektas kaj faras metiartaĵojn laŭ siaj apartaj vivmanieroj, kio plene montras ilian amon al la vivo kaj ilian sopiron al la feliĉo. Inter tiuj metiartaĵoj la vaksaj tinkturaĵoj, brodaĵoj, plektaĵoj k.a. plejparte estas faritaj de virinoj. Iliaj desegnoj havas kuragan imagon, fortan kontraston kaj belajn kolorojn kaj ili estas vaste uzataj por ornamu virinajn vestojn, kaptukojn, kolumojn, manikojn, antaŭtukojn, jupojn, litkovrilojn, paktukojn, mantukojn, kurtenojn k.a. Iliaj fajencaĵoj havas longan historion. Ilia formo estas simpla, stilo antikva, glazurkoloro pura kaj desegno nacigusta. La malgrandaj fajencaĵoj estas bele faritaj.




Printempo (Murpendaĵo de vaksa tinkturaĵo)
de XU YI kaj LIN FARONG


Fajencaĵoj

Projektitaj de LIU YONG k. a.





Mjaŭ-a teksaĵo (Antaŭtuko)



Ajura brodaĵo de mjaŭ-oj

Kokoj (Murpendaĵo de vaksa tinkturaĵo)
de LU GUOCHANG

